

septembro 1970

63-a jaro

n-ro 778 (9)

esperanto

oficiala organo de

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)

nieuwe binnenweg 176 - rotterdam-3002 - nederlando - redaktoro: v. sadler



Prezidanto Jonas
malfermis la 55-an
Universalan Kongreson
- en Esperanto

Vi trovos

sur la sekvantaj paĝoj, post la senprecedencaj kaj enhance mem-
rindaj salutvortoj de Prezidanto Franz Jonas, la tradicie ampleksan
raporton pri tiu ĉiujara evento, la Universala Kongreso de Espe-
ranto. Pro sia samtempeco kun la UK, alia evento, neniel ĉiujara,
riskas perdi la atenton: la apero de la longe sopirata Plena Ilus-
trita Vortaro. Tial ni aparte direktas ĉiujn legantojn al la recenzo
sur paĝo 139.

Per tiu ĉi numero finiĝas unu epoko en la teknika historio de la
revuo "Esperanto". Ekde la oktobra eldono ni eniras la epokon
de ofseta presado kaj, tial, transiras ankaŭ al alia presejo. Ni
esprimas ĉi tie nian profundan dankon al la firmo Zwagers, kiu
dum 15 jaroj ne nur fidele produktadis la revuon tra ĉiuj ĝiaj
sortoturnoj, sed ankaŭ helpadis amike per ĉiaj konsiloj kaj kom-
plezoj.

Dankon ankaŭ al d-ro W. A. Verloren van Themaat, kiu kunlaboris
en la raportado de la 55-a UK.

Enhavo

- 125 Parolas Federacia Prezidanto Franz Jonas
- 126 Por la morala-intelekta integriĝo de la homaro
— Festparolado (Lapenna)
- 130 Nekrologo (Jaumotte)
- 130 La kongresaj resolucioj
- 131 La laborkunsidoj — decidoj de la Estraro kaj Komitato
- 132 ISU 1970
- 134 Oratoroj kaj poetoj (konkursoj)
- 135 Teatro kaj aliaj artoj
- 136 Intervjuo kun du kongresanoj
- 137 Tre internacia Infana Kongreseto
- 138 Omaĝoj ĉe la solena fermo
- 139 Plena ilustrita vortaro jam aperis!
- 140 Loke — Fake — Persone
- 141 Nekrologoj (Brandt, Montandon, Pivac, Vanĉik)
- 142 Esperanto en radio
- 143 Oficiala informilo n-ro 437
- 143 Servoj de UEA
- 144 Anoncetoj

La kovrilo

Unu el la plej kortuŝaj momentoj de la 55-a Universala Kongreso
en Vieno: kvar geknaboj el la Infana Kongreseto alkuras por bon-
venigi Prezidanton Jonas per florbukedo kaj per kelkaj salutvortoj
klare kaj kuraĝe elparolataj. Maldekstre atendas prof. Lapenna,
dum malantaŭ la ŝtatprezidanto vidiĝas kelkaj el la reprezentantoj
de registaroj — rekorde multnombraj en la ĉi-jara Kongreso. La
salutparoladon, per kiu d-ro Jonas malfermis la Kongreson, ni
presigas komplete sur la apuda paĝo. En ĝi, la Alta Protektanto
de la Kongreso mallonge skizis la historion de Esperanto en
Aŭstrujo kaj finis per konsilo ne atendi tro da iniciatoj de la ŝtataj
aŭtoritatoj, sed progresigi Esperanton per vasta diskonigo sur la
popola nivelo.

esperanto

Oficiala organo de Universala
Esperanto-Asocio, Nieuwe Bin-
nenweg 176, Rotterdam-3002, Ned.
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1882-1910).

Inkluzivas la organon de TEJO
"La Juna Vivo" (TEJO-paĝo)

Aperas monate (escepte de aŭg.)

Abonprezo por unu kalendara
jaro 22,50 gld. (kun membreco
kaj Jarlibro: 30,— gld.). Unuopa
ekzemplero: 2,— gld. Por aerpoŝto
aldonu: Aŭstralio kaj Nov-Zelando
13,75 gld. jare; Arg. 11,—; Jap.,
Braz., Sud-Afr. 8,25; Kan., Usono,
Meks. 5,50; Israelo 2,75.

Anonc-tarifo: 1 paĝo = 285 gld.;
½ p. = 150 gld.; ¼ p. = 85
gld.; ⅛ p. = 50 gld.; 1/16 p. =
35 gld. Kliŝokostoj ekstere. Ripet-
rabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope,
Blaak 10, Rotterdam-3001.

Ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telefono: (010) 23 27 88.

Telegramoj:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Presejo: Drukkerij Zwagers,
Rotterdam-3006.

Legantoj en 87 landoj.

estraro de uea

Prezidanto kaj estrarano pri ek-
steraj rilatoj, landaj kaj fakaj aso-
cioj, delegita reto kaj diskonigo
de la agado de UEA: Prof. d-ro
Ivo Lapenna, 77 Grasmere Ave.,
Wembley, Middx, HA9 8TF, Brit.
Vic-prezidanto kaj estrarano pri
komercaj kaj industriaj rilatoj:
S-ro E. L. M. Wensing, Postbus
412, Eindhoven, Nederlando.

Vic-prezidanto kaj estrarano pri
turismo kaj aŭtomobilismo: S-ro
E. Carlén, Yxhult, S 690 60 Hälla-
brottet, Svedujo.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano
pri informado: S-ro G. Becker,
D-6653 Blieskastel, Alter Han-
garten 2, Germanujo.

Estrarano pri TEJO kaj junularaj
aferoj: S-ro U. J. Moritz, D-5161
Merken, Andreasstr. 57, Germa-
nujo.

Estrarano pri kongresoj kaj kon-
ferencoj: S-ro J. Thierry, 5 rue
Léon Cogniet, F-75-Paris (17e),
Francujo.

Estrarano pri kulturaj aferoj kaj
eldonaĵoj: S-ro J. Uŝpienski, p/a
PEA, ul. Jasna 6, Warszawa 1,
Polujo.

Estrarano pri financoj kaj admi-
nistrado: S-ro E. J. Woessink,
Vondellaan 47, Arnhem, Ned.

Parolas Federacia Prezidanto Franz Jonas

**55a UK
Vieno:
Inaŭguro**

Tre ŝatata prezidantaro, tre ŝatataj sinjorinoj kaj sinjoroj!
La kvindek-kvina Universala Kongreso de Esperanto unuigas en Vieno du mil adeptojn de la Internacia Lingvo (Esperanto). Tio estas bonvena okazo por la Federacia Prezidanto de la Respubliko Aŭstrio, saluti la kongresanojn nome de la aŭstria popolo, kaj ankaŭ saluti ilin kiel samideano.

Vi estas gastoj en lando, kiu ĉiam estis favora al Esperanto kaj instigis la movadon en kelkaj direktoj. En la jaro 1904 jam okazis en Graz la unua aŭstria Esperanto-kongreso; do unu jaron antaŭ la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-sur-mar, en kiu Zamenhof parolis sian faman inaŭguran paroladon. Intertempe okazis en nia lando jam du kongresoj de la Universala Esperanto-Asocio, tio estas en la jaroj 1924 kaj 1936, kaj tri kongresoj de la Sennacieca Asocio Tutmonda, tio estas en 1925, 1955 kaj 1962.

Ekde la komenco, la movado en Aŭstrio sukcese evoluigis, sed bedaŭrinde interrompita dum la du mondmilitoj kaj malpermesata dum la aŭtokrataj reĝimoj. Tiel la Esperanto-movado travivis la saman sorton kiel multaj aliaj kulturmovadoj. Hodiaŭ denove ekzistas vigla Esperanto-movado kun diversaj branĉoj. Apud la Aŭstria Esperantista Federacio agas specialaj unuiĝoj de socialistoj kaj katolikoj, de fervojistoj kaj naturamikoj. Depost 1925 ekzistas en Aŭstrio ŝtata Ekzamen-Komisiono kaj en la jaro 1929 estiĝis en Vieno la fama Internacia Esperanto-Muzeo. Post la lasta milito fondiĝis la Aŭstria Esperanto-Instituto kaj krome Asocio por internacia interkompreniĝo. Ekzistas ankaŭ pluraj gazetoj regule aperantaj.

Povas do esti, ke eksterlandaj samideanoj gratulas la aŭstriajn esperantistojn pro la bona stato de la movado. Sed, mi diros al vi, ke la aŭstriaj esperantistoj mem ne estas kontentaj. Ili sentas la samajn malfacilaĵojn kiel la samideanoj en aliaj landoj. Kvankam la internacia vivo fariĝas ĉiam pli intensa, la oficiala mondo daŭrigas la malnovajn kaj maltaŭgajn metodojn de lingva interkompreniĝo. Estas vero, ke la moderna tekniko helpas faciligi la taskon de la profesiaj tradukistoj dum kongresoj, sed ne pli. Iliaj teknikaj aparatoj estas maltaŭgaj ludiloj kompare kun la mondvasta farenda tasko, nome superi la lingvajn barojn inter la popoloj, inter milionoj da homoj. Tial la esperantistoj nuntempaj devas pensi kiel realistoj, ili devas pli varbi kaj per novaj rimedoj. Ili turnu sin ĉefe al la junularo, al ĉiuj interesuloj, ankaŭ al ĉiuj, kiuj estas respondecaj por la bonstato de la popoloj kaj ŝtatoj. Sed ĉar mi en tiu rilato mem faris multe da spertoj, mi avertas vin: ne atendu tro multe kaj ne postulu tro multe de la oficialaj funkciuloj, sed fidu pli la propran forton! Se la Esperantomovado estas forta, la oficialaj institucioj de si mem agnoskos ĝian gravecon kaj signifon.

La problemo de internacia helplingvo jam delonge ne plu estas nura teorio. Esperanto solvis tiun ĉi problemon, ĝi realigis la teorion kaj transigis ĝin al praktiko. Dum jardekoj en multaj landoj ne nur estas tradukitaj juvelaj verkoj el naciaj literaturoj, sed aperas ankaŭ multege da verkoj skribitaj originale en Esperanto. En multaj landoj aperas Esperanto-gazetoj, kiuj ne nur perfektigas la adeptojn en lingva rilato, sed ankaŭ disvastigas valoran scion trans la etnikajn limojn, de kontinento al kontinento, tra la tuta mondo.

Esperanto ĝis nun sukcese trapasis ĉiujn ekzamenojn, al kiuj ĝi estis submetata flanke de scienco kaj tekniko, de politiko kaj komerco, de pedagogio kaj literaturo. Kian pruvon do pri la taŭgeco de Esperanto la dubantoj krome bezonas? Nur la propran sperton, propran sperton anstataŭ malsaĝa antaŭjuĝo!

Karaj gesinjoroj, la esperantistoj dum la pasintaj jardekoj konsekvence varbis por la ideo de interkompreniĝo per internacia helplingvo. Ili estis la profetoj de la movado. La nuna generacio de esperantistoj jam estas la pioniroj de Esperanto en praktika vivo. Sed ili neniam forgesu, ke Esperanto ne nur estas rimedo por la ĉiutaga praktika vivo, sed ke ĝi estas eterne ligata al grandaj kaj altaj idealoj: al solidareco de la popoloj, al progreso de la homaro, al paco de la mondo! Tiamaŭniere portante pluen la spiriton de humanismo, kiu ardigis ĝis nun tiom da esperantistoj, ni inaŭguru la 55an Universalan Kongreson de Esperanto. — Mi deziras al ĝi plenan sukceson kaj al la kongresanoj neforgeseblajn travivaĵojn en Aŭstrio.

Por la morala- intelekta integriĝo de la homaro

En sia festparolado antaŭ la 55-a Universala Kongreso en Vieno la prezidanto de UEA, profesoro Lapenna, komparis la sensacian antaŭensalton de la scienco kaj tekniko kun la postrestado de la socia-politika ordo en la mondo. La homaro devas transformiĝi en unu komunajon, same tiel morale kaj intelekte, kiel jam el teknika vidpunkto; sen tio ĝi pereos. Por tia integriĝo necesas Esperanto, kaj por ĝia enkonduko necesas labori laŭ modernaj, sciencaj metodoj.

En tiu ĉi momento, kiam ni inaŭguras la laborojn de la 55-a Universala Kongreso de Esperanto, du faktoj trudas sin al niaj mensoj.

I.

Ni vivas en epoko de grandaj transformiĝoj, laŭ la amplekso kaj intenseco neniam antaŭe spertitaj de la homaro. La homo — tiu fragila infano de la animala mondo, tiu iama timplena viktimo de potencaj naturaj fortoj, dependanta de la kapricoj de la elementoj — sukcesis, dank'al siaj labor-kapablaj manoj kaj scivolema cerbo, ne nur savi kaj konservi sin, sed ankaŭ fariĝi mastro de la terglobo.

Vere spektaklajn rezultojn li atingis en la daŭro de la du lastaj generacioj. En la 6-a jarcento antaŭ nia erao la antikvaj grekoj ekmarŝis la vojon de scienca aventuro, kiu en niaj tagoj kondukis nin al la luno kaj en la senfinajn spacojn de la universo. Dum du jarmiloj kaj duono la homaro daŭre akiradis pacience kaj persiste, ereton post ereto, novajn sciojn pri sia ĉirkaŭaĵo — bedaŭrinde pli pri ĝi ol pri si mem — por atingi gigantan kulminon de tiu evoluoprocezo en la 20-a jarcento, kiam la kvante akumulitaj scioj rezultigis vere revolucionan salton en novan kvaliton. En nuraj sep jardekoj de tiuj ĉi jarcento ni transiris de la aŭtomobila periodo, tra la aviadila epoko, al la nuna tempo de spacveturado kun ĉiuj aliaj inkluzivitaj atingoj kaj sekvoj de tiuj koncizaj karakterizoj.

La nuklea energio kaj tuta aro da aliaj malkovroj en ĉiuj branĉoj de scienco kaj tekniko, daŭre kaj fulmorapide farantaj pluajn progresojn — tiuj



benoj aŭ malbenoj por la nunaj kaj estontaj generacioj depende de ilia utiligo por la bono, aŭ de ilia misuzo por la malbono — kaŭzis tiajn radikalajn ŝanĝojn de la materia vivo, ke fakte ni jam eniris en esence novan eraon, malsaman ne laŭgrade, sed laŭspece de kio ajn alia en la tuta historio, kvankam ankoraŭ tre malmultaj efektive sentas kaj kapablas koncepti tion.

Pro la enormaj materiaj fortoj, pri kiuj ĝi disponas kaj kiuj samtempe prezentas kaj brilajn perspektivojn por prosperado de ĉiuj en paco kaj amika kunlaboro, kaj seriozan minacon de komplete sindetruo, la homaro por la unua fojo objektivite kaj reale fariĝis unusola monda komunaro de popoloj kaj individuoj.

Tio estas la unua konstato.

II.

En la lastaj kvindek jaroj okazis ankaŭ provo ŝanĝi la politikan kaj juran strukturon de la mondo.

Meze de tiu ĉi eventoplena duona jarcento troviĝas la fondiĝo de la nova monda organizaĵo de ŝtatoj. Precize antaŭ 25 jaroj, la 26-an de junio 1945, dum la ferma kunsido de la Konferenco en San Francisko, estis solene subskribita la Ĉarto de UN. Kelkajn monatojn poste, en oktobro de la sama jaro, ĝi ekvalidis, kaj la 10-an de januaro 1946 je la 4-a horo posttagmeze, en la Centra Halo de la fama Westminster-Palaco en Londono, komenciĝis la Unua Sesio de la Ĝenerala Asembleo en la ĉeesto de la reprezentantoj de la 51 Ŝtatoj-Membroj. UN eklaboris akompanata de sinceraj bondeziroj kaj grandaj espero de la tuta homaro ankoraŭ sanganta el miloj da apertaj, ne cikatriĝintaj vundegoj.

Nun la Organizaĵo, kies membraro pli ol duobliĝis, funkcias jam 25 jarojn. En la vivo de la homaro tio verŝajne estas malpli ol unu sekundo en la meza vivo de unuopa homo. Sed same kiel tiu unu sekundo aŭ eĉ ĝia frakcio povas esti fatala por la ekzisto de individuo, tiel same 25 jaroj, aŭ eĉ multe malpli, povas esti decidaj por la homaro.

Kio, do, okazis en tiuj ĉi 25 jaroj?

La celoj de kiu ajn milito ne povas ne reflektiĝi, almenaŭ ĝis certa grado, en organizo de la paco. El vidpunkto de la venkintaj Aliancanoj la Dua Granda Mondmilito havis defendan, liberigan karakteron. Milionaj amasoj sindone, kuraĝe, vere heroece luktis sur ĉiuj batalkampoj, kaj aliaj milionoj sin oferadis malantaŭ la frontlinioj certe ne malpli kuraĝe kaj heroece, dum ĉiuj spertadis senfinajn korpajn suferojn kaj psikajn dolorojn, ne por subigi aŭ sklavigi, sed por protekti sin mem kontraŭ la subigo kaj liberigi ĉiujn.

En la Solena Enkonduko de la Ĉarto emfaze eĥas la inspiraj idealoj proklamitaj dum la milito: savi la estontajn generaciojn de tiu plago, kiu jam du fojojn en la daŭro de unu homa vivo trudis al la homaro ne eldireblajn suferojn; rekonfirmi la fidon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa persono, je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj kaj je suverena egaleco de ĉiuj nacioj, grandaj kaj malgrandaj; respektigi la devojn rezultantajn el traktatoj kaj aliaj fontoj de internacia juro; antaŭenigi socian progreson kaj atingi pli altan vivnivelon en pli granda libereco.



Reprezentanto de la usona registaro (ĉu unuafoje?) salutas la Universalan Kongreson — en Esperanto! Krom la aŭstra, 16 registaroj aŭ ambasadoj (rekorda nombro) reprezentiĝis en la inaŭguro: la belga, bulgara, ĉeĥoslovaka, dana, finna, greka, hungara, israela, itala, jugoslava, norvega, pola, sveda, svisa, urugvaja kaj usona. El tiuj, 6 salutis rekte en Esperanto, la ceteraj nacilingve kun traduko.

El la membroj de la Honora Komitato (kiu inkluzivis la kancelieron, la vickancelieron kaj 7 ministrojn) ĉeestis unuavice la ministro pri internaj aferoj, dum 4 aliaj persone ĉeestis aŭ reprezentiĝis. Per mallongaj paroladoj salutis 26 el la aliĝintaj landaj asocioj de UEA, 6 nealiĝintaj (3 skribe) kaj 5 landoj sen organizita movado. La salutantoj kanada kaj nov-zelanda transdonis krome personajn salutojn respektive de ĉefministro Pierre Trudeau kaj de la ĉefministro kaj ministro pri edukado nov-zelandaj. Inter skribaj bondeziroj estas aparte menciindaj tiuj de kardinalo König, Vieno.

Maldekstre: kolstreĉa atento dum la inaŭguraj paroladoj.

Ne estis unusola tago de paco tutmonda

(daŭrigo de la fest-parolado)

Ne estas ĉi tie la loko por esplori, ĉu la idealoj fariĝis realo, almenaŭ parte. Konciza analizo estos donita en la kadro de nia Internacia Somera Universitato. Sed necesas diri jam nun, ke UN ja havis plurajn sukcesojn en diversaj sferoj, sed bedaŭrinde tutcerte ne plenumis sian ĉefan kaj plej gravan taskon, nome la konservon de internaciaj paco kaj sekureco; la establon de tia mondo, en kiu ĉiu nacio, eĉ la plej malgranda, povus vivi, progresi kaj evoluigi sian identecon en paco kaj trankvilo; en kiu ĉiu individuo rajtas plene ĝui la fruktojn de daŭra paco; en kiu la gigantaj rezultoj de scienco kaj tekniko estus plene utiligataj ne por produktado de ĉiam pli teruraj instrumentoj de detruado kaj eĉ de plena neniigo, sed por la bonfarto kaj feliĉo de ĉiuj. Dum 25 jaroj de funkciado de UN ne ekzistis unusola tago de paco en la tuta mondo. Eĉ en la nuna momento dudeko da pli aŭ malpli grandaj militoj, kiujn oni eŭfemisme nomas armitaj konfliktoj aŭ incidentoj, mortigas niajn homajn kunfratojn, detruas materiajn havaĵojn kaj dezertigas tutajn regionojn, dum milionoj plue suferas pro manko de nutraĵo, kaj vivoj de infanoj estingiĝas pro malsato. Tio ne estas mondo digna de la nomo Homo Sapiens; certe ne la mondo de justeco, kies vizio inspiris al superhomaj oferoj dum la lasta milito. Tio estas honto kaj krimo kontraŭ si mem, aŭ, kiel U Thant, la Ĝenerala Sekretario de UN, esprimis sin iom pli singarde: "Progreso en la direkto de justeco kaj homa solidareco serioze postrestis malantaŭ la scienca kaj teknika progreso."

La fakto estas, ke la homaro ankoraŭ ne trovis sociajn, politikajn kaj eĉ kulturajn instituciojn, adekvatajn al la atingoj de la scienco kaj tekniko.

Subjektive, nome el morala-intelekta vidpunkto, la homaro certe ne transformiĝis en unusolan komunajon de popoloj kaj individuoj.

Kaj tio estas la dua konstato.

III

La malharmonio inter la grandiozaj atingoj de la scienco kaj tekniko, unuflanke, kaj la konsiderinde postrestintaj formoj de socia-politika kunvivado, aliflanke, sentiĝas ĉiam pli forte ne plu kiel nura malagrabra disonanco, sed rekte kiel unu el la fundamentaj sociaj antagonismoj de la nuntempo en mondaj dimensioj. Ni, la uzantoj de la Internacia Lingvo, sentas kaj perceptas tion multe pli ol la aliaj, ĉar tiu mirinda instrumento de internacia komunikado kaj potenca rimedo de vere internacia kompreniĝo ebligas al ni konceptadi la homaron kiel unuecan tuton. Ĝuste tial ni donas apogon al ĉiuj sinceraj kaj honestaj klopodoj, tute egale de kiu flanko ili venas, celantaj plibonigon



Ĉe la gazetara konferenco, tuj antaŭ la UK, la jurnalistoj montris viglan interesiĝon — eĉ pri lingvistikaj kaj filozofiaj aspektoj de Esperanto.

de internaciaj rilatoj sur kiu ajn kampo: ekonomia, socia, politika, kultura aŭ alia. Tial ni kontribuas ankaŭ al la Internacia Jaro de Edukado, iniciatita de Unesko kaj aprobita de la Ĝenerala Asembleo de UN. Tion ni faras konforme al la komuna celo de tiu kampanjo, sed laŭ aparta programo, kiu respondas al la celoj kaj idealoj de la Esperanto-Movado. Interalie unu el la ĝeneralaj kunvenoj de la Kongreso estos plene dediĉita al tiu ĉi demando. Necesas, tamen, akcenti la simplan veron, ke ĉiuj ajn metodoj aplikataj en edukado al internacia kompreniĝo devas aŭ resti plene senefikaj aŭ havi nur minimumajn rezultojn, se oni ne venkas la lingvan obstaklon kiel fundamentan baron al interhoma komunikado de la popolaj amasoj.

Kiel ĉiuj sociaj antagonismoj, ankaŭ la prezentita antagonismo inter la objektiva kunligiteco de la mondo kaj la foresto de subjektiva unueco ne nur povas, sed necese devas esti solvita. Nur du vojoj eblas: aŭ la kreskantaj eksplodaj tensioj kondukos al la fina katastrofo de ĉiuj, aŭ la homaro sukcesos rapidigi la procezon de sia morala-intelekta integriĝo sur pli alta ŝtupo, adaptante sian subjektivan sintenon al la objektivaj kondiĉoj, nome al la materiaj fortoj, kiujn ĝi mem kreis, sed kiujn ĝi ankoraŭ ne lernis regi. Superflue diri, ke por tia supera integriĝo surbaze de egaleco kaj en maksimuma libereco, la utiligo kaj apliko de komuna neŭtrale homa lingvo estas unu el la plej gravaj faktoroj; mi kuraĝas diri eĉ pli: ĝi estas la esenca antaŭkondiĉo.



De maldekstre: KKS Nevan, prof. Lapenna, d-ro Grimme (prez. LKK), ĝen. sek. Becker, dir. Sadler, d-ro Bormann (prez. GEA).

Milionoj legis pri UK

La Universala Kongreso ricevis ĝenerale vastan kaj favoran atenton en la monda gazetaro. Kvan- kam ankoraŭ ne eblas havi plenan superrigardon (UEA enketos detale pri la rezultoj por laŭeble pli bonigi ilin venontjare), jam alvenadas eltondajoj kaj informoj ĉe la Centra Oficejo en Rotterdam. En Aŭstrujo mem aperis minimume 29 artikoloj kaj informoj, kaj parto de la Solena Inaŭguro aperis en televido. En la najbara FR Germanujo la tuta gazetaro skribis abunde. En Francujo raportis Le Figaro, sendinte specialan raport- iston, kaj pluraj aliaj gazetoj. Almenaŭ po 2-3 artikoloj aperis en Svislando kaj Italujo, dum eĉ en Rumanujo, kies gazetaro kutimas prisilenti Esperanton, troviĝis pluraj favoraj mencioj. Instrua estas la kontrasto inter Nederlando, kie ŝajne aperis nur unu artikolo (de d-ro Verloren van Themaat), kaj Belgujo, kies ĉefaj gazetoj raportis plurfoje pri la Kongreso, interalie surbaze de intervjuoj kun Jo Haazen. La unuaj eĥoj ekster- eŭropaj: en la ĉefa gazeto de Japanujo, Asahi Ŝimbun, aperis detala raporto pri Esperanto kaj la UK de prof. Tadao Umesao, en pli ol 5 milionoj da ekzempleroj! Kaj la usona semajna gazeto Time (3,7 milionoj) menciis la laŭmodan lingvaĵon de la junaj kongresanoj en Vieno. En aliaj landoj la plej uzata temo estis la salutparolado en Esperanto de prez. Jonas.

Efektive, sen la ĝeneraliĝo de la uzo de Es- peranto en internaciaj rilatoj de la popoloj tia integriĝo ne estas imagebla.



Ne sufiĉas nur pasive esperi, ke la homaro ekiros tiun duan vojon, la solan, kiu povas turni ĝin for de la abismo, antaŭ kiu ĝi troviĝas. Al- done al firma fido necesas multege da konscia kaj respondeca laboro, bazita sur sciencaj esploroj kaj analizoj de la leĝoj regantaj la homan socion.

En nia konkreta situacio ne sufiĉas nur konscii pri la decida rolo de komuna lingvo en la procezo de integriĝo; nek sufiĉas nur ripoze kontentiĝi per ĉio jam kreita en la Internacia Lingvo aŭ pere de ĝi, kaj atendi, ke per si mem, tute spontane, la lingvo plue disvastiĝos kaj aŭtomate manifestos sian pozitivan funkcion. Ne, precipe en nia aparta kazo ni ĉiuj kaj ĉiuj niaj organizaĵoj devas mak- simume intensigi la klopodojn, utiligante plej racie la disponeblajn homajn fortojn kaj financajn ri- medojn.


Ni vivas en moderna epoko de scienco kaj tekniko. Naŭdek pocentoj de ĉiuj sciencistoj, kiuj iam ekzistis, vivas en la nuntempo. Nur sci- ence pruvitaj faktoj havas valoron kaj estas akceptataj. Sciencaj analizoj, objektivaj statistikoj kaj komputeroj regas kolektivojn kaj individuojn.

Tiu moderna mondo diktas al ni modernajn, science bazitajn labormetodojn en ĉiuj sencoj, sed ĉefe en du direktoj: unuflanke, scienca esplorado,

dokumentado kaj analizado de ĉiuj aspektoj de la lingva problemoj; aliflanke, evoluigo de la fak- scienca vortara provizo kaj ĉiam pli ampleksa utiligado de la lingvo por fakaj sciencaj celoj. UEA jam agas laŭ siaj eblecoj en ambaŭ direktoj. Ĝia Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj la elstara publikaĵo "La Monda Lingvo-Problemo" jam produktis mult- nombrajn sciencajn studojn, objektivajn dokumentojn kaj aliajn materialojn, kaj sukcesis multflanke korekti deformitajn imagojn kaj falsajn opiniojn. Aliflanke, pluraj el niaj organizaĵoj trafe evoluigas la lingvon en fakaj sferoj, publikigas fakajn periodaĵojn kaj penetras en fakajn mediojn. Ankaŭ dum tiu ĉi kongreso aparta kunveno pristudos tiujn deman- dojn kun la celo sistemigi kaj intensigi la laboron sur tiu kampo.

Scienco kaj tekniko, mi ripetas, mastras kaj ĉiam pli mastros la homan socion. Ne nur la cen- traj organoj de UEA kaj kelkaj aliaj niaj institucioj en diversaj landoj, sed ĉiuj niaj organizaĵoj kaj instancoj apliku kiel eble plej efikajn sciencajn metodojn en ĉiuj siaj klopodoj kaj agadoj por disvastigo de la Internacia Lingvo, por ke ĝi povu plene ludi tiun rolon en la nuna mondo de scien- ceco, kiun ĝi meritas, kaj plenumi sian historian taskon en la integriĝo de la homaro surbaze de egaleco kaj justeco, sen privilegioj por unuj kaj malavantaĝoj por aliaj, en libereco kaj prospero por ĉiuj.

Glosoj: fragila = malfortika, rompebla; enorma = grandega



**MAURICE
JAUMOTTE**
1899 - 1970

Nekrologo

La 30-an de julio, du tagojn antaŭ komenciĝo de la 55-a Universala Kongreso en Vieno, kien li intencis iri, mortis Maurice Jaumotte, sendube elstara personeco de nia nacia kaj internacia movado. La terura sciigo konsternis la belgajn esperantistojn kaj la partoprenantojn al la UK, kie la Estraro de UEA intencis proponi al la Komitato nomi la forpasinton Honora Membro.

Maurice Jaumotte naskiĝis la 5-an de aprilo 1899 en Antverpeno kaj jam en 1917 sekvis kelkajn Esperanto-lecionojn. En 1927 li prezidantiĝis en Verda Stelo, konata antverpena Esperanto-grupo, kaj restis en tiu funkcio ĝis 1969. Sen ia dubo li ludis gravan rolon en la belga Esperanto-movado; li estis kunfondinto de Belga Esperanto-Instituto, prezidanto de Reĝa Belga Ligo Esperantista, redaktis la franclingvan parton de "Belga Antologio" kaj gvidis multajn kursojn eĉ en la radio.

Tri okazintaĵoj, kiuj ĉefe rilatas al la enlanda belga movado, estis tre karaj al li: la unua estis la debato kun la iniciatinto de la lingvoprojekto Neo, kiam Jaumotte kun spirito logika simple forviŝis sian kontraŭparolanton; la dua estis la kunfandiĝo (1962) de Reĝa Belga Ligo Esperantista kaj Flandra Ligo Esperantista en la Belgan Esperanto-Federacion, kies unua prezidanto li iĝis; la tria, la fondaĵo Jaumotte-Loquet, kies rentumoj devus ebligi la plibonigon de la informado en Belgujo.

Tia esperantisto necese transiris al la internacia movado, estis elektita estrarano de UEA en 1964, starigis la Internacian Esperanto-Klubon Aŭtomobilistan kaj estis kunlaboranto de la ĵus aperinta Plena Ilustrita Vortaro. La 6-an de junio 1970 li plenaktive ankoraŭ prezidis kunvenon de Instituto Hodler 68 en Roterdamo.

Nelacigebla sur Esperanto-kampo kaj sukcesplena organizanto, li samgrade sukcesis en sia privata vivo, ekz-e kiel ĵurnalisto, kiel direktoro de industria entrepreno kaj kiel konata funkciulo de la Ruĝa Kruco en Belgujo.

Oni nur povas admiri kaj danki: li metis senhezite sian kapablecon je la dispono de la movado, en kies fina venko li firme kredis.

Elkorajn kondolencojn al sinjorino Jaumotte-Loquet, kaj dankojn pro la granda parto de ŝia koro, kiun ŝi dediĉis, kune kun la edzo, al Esperanto.

La Kongresaj Rezolucioj

La 55-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vieno de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1970, inaŭgurita la 2-an de aŭgusto de Lia Moŝto la Prezidento de Aŭstrujo en la ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de 16 ŝtatoj kaj de 1987 reprezentantoj de la Esperanto-movado el 46 landoj, memorigis la 25-jaran datrevenon de la fondiĝo de UN kaj pritraktis kiel ĉefajn temojn

(a) la rolon de la Internacia Lingvo kiel instrumento por edukado al internacia konceptado de la mondo (en ligo kun la Internacia Jaro de Edukado), kaj

(b) la esencajn trajtojn de la lingva problemo en la scienco.

La Kongreso

1. **Konstatas** la fakton, ke, unuflanke, pro la enormaj materiaj fortoj, kreitaj ĉefe de la modernaj scienco kaj teknologio, la homaro por la unua fojo en sia historio objekte kaj reale fariĝis unu sola monda komunajo de popoloj kaj individuoj, sed ke, aliflanke, ĝi ankoraŭ ne trovis internaciajn sociajn, politikajn kaj kulturajn instituciojn, adekvatajn al atingoj de scienco kaj teknologio; tial el morala-intelekta vidpunkto la homaro certe ne transformiĝis en unusolan komunajon de popoloj kaj individuoj.

2. **Rigardas** la malharmonion inter la grandiozaj sciencaj atingoj kaj la konsiderinde postrestintaj formoj de socia-politika kunvivado kiel unu el la fundamentaj antagonismoj de la nuntempo en mondaj dimensioj.

3. **Esprimas** la konvinkon, ke necesas urĝe kaj konscie rapidigi la procezon de morala-intelekta integriĝo de la homaro sur pli alta ŝtupo por adapti ĝian subjektivan sintenon al la objektivaj kondiĉoj, nome al la materiaj fortoj, kiujn ĝi kreis sed kiujn ĝi ankoraŭ ne lernis regi.

4. **Tial donas sian apogon** al la Internacia Jaro de Edukado kaj al similaj iniciatoj, sed altiras la atenton de UN, Unesko kaj la Ŝtatoj-Membroj, ke ĉiuj ajn metodoj aplikataj en edukado al internacia kompreniĝo devas aŭ resti senefikaj aŭ doni nur minimumajn rezultojn, se oni ne venkas la lingvan obstaklon kiel fundamentan baron al interhoma komunikado de la popolaj amasoj, por kio la facila, nuancita kaj politike neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto prezentiĝas kiel la sola racia solvo.

5. **Komisias** la Estraron de UEA kaj la landajn organizaĵojn komuniki tiun ĉi Rezolucion al UN, Unesko kaj al la Registaroj de ĉiuj ŝtatoj de la mondo.

La Kongreso ankaŭ

1. **Konstatas**, ke la granda progreso sur la kampoj de scienco kaj tekniko kaŭzas rimarkindajn disbranĉiĝon kaj kreskantan specialiĝon laŭ la fakoj kaj subfakoj, kaj ke la procezo de specialiĝo reflektiĝas en konsiderinda kresko de fakaj terminoj, komplete aŭ preskaŭ tute nekonataj ekster la koncernaj fakaj medioj; ke, aliflanke, la lingvo-diverseco obstaklas internaciajn interŝanĝojn de scioj, novaj malkovroj kaj spertoj, kaj malebligas aŭ malfaciligas personan komunikadon. Rezulte, la lingva problemo sentiĝas ĉiam pli forte en ĉiuj branĉoj de la scienco kaj en ĉiuj fakoj.

2. **Rekomendas** al la sciencaj kaj fakaj Esperanto-organizaĵoj intensigi sian agadon en siaj respektivaj medioj aplikante al sia laboro la koncernajn punktojn de la Dua Baza Laborplano de UEA kaj la decidojn de la kunveno de la reprezentantoj de fakaj organizaĵoj, fakdelegitoj kaj delegitoj okazinta dum la Kongreso.

3. **Alvokas** ĉiujn Esperanto-organizaĵojn apliki kiel eble plej multe modernajn, sciencajn metodojn en la laboro por plua disvastigo de la Internacia Lingvo kaj utiligi tiucele unuavice la publikaĵojn kaj la dokumentojn de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, kaj la materialojn publikigitajn en ĝia periodaĵo "La Monda Lingvo-Problemo".

La laborkunsidoj

dividiĝis en kvar grupojn: kunsidoj de la Estraro de UEA, kunsidoj de la Komitato, la du Ĝeneralaj Kunvenoj de UEA kaj aliaj laborkunsidoj.

Se komenci per la lasta grupo — kiel kutime, tre multaj fakaj organizaĵoj utiligis la Kongreson kiel 'tegmenton', por sub ĝi okazigi jarkunvenojn, publikajn diskutojn, fakajn prelegojn k.s. Aparta kunveno organizita de UEA pritraktis la "Rolon de la fakaj asocioj kaj fakdelegitoj" kaj la "Funkcion de delegito de UEA". Ĝiajn rezultojn ni prezentos en posta numero de "Esperanto".

La Unua Ĝenerala Kunveno donis al la membroj de UEA okazon diskuti kaj kritiki la Estraran Raporton pri 1969/70 kaj ricevi respondojn de pluraj estraranoj. La diskutoj tuŝis la ekonomion de la novaj (komposto- kaj foto-) maŝinoj en la C.O., la mankojn de la delegita reto, la malfruiĝon de la Jarlibro, la redaktadon de "Esperanto" kaj "La Praktiko", la uzon de naciaj lingvoj en la Universalaj Kongresoj (salutparoladoj de diplomatoj, presitaj varbmaterioj k.a.), la objektivcon de la raporto de CED kaj de la kongresaj rezolucioj, partoprenon de ekstera publiko en la UK-oj, la organizon de la informa laboro kaj plurajn aliajn punktojn.

(turnu)



BRILA ESTIS LA SCENO

en la urbodomo de Vieno, kiam la urbestro Bruno Marek (membro de la Honora Komitato de la Kongreso) bonvenigis kaj abunde regalis la preskaŭ 2 000 kongresanojn. Granda estis ankaŭ la partopreno en la Oficiala Bankedo (pli ol 400) kaj kompreneble ankaŭ en la ceteraj festaj kaj distraĵ aranĝoj: la Interkonatiĝa Vespero, la Balo, la Junulara Vespero kaj la multaj ekskursoj. Al la regalado kontribuis ankaŭ unuopaj ambasadoj (belga, germana FR, pola kaj unuafoje ankaŭ la usona en tia senco), kiuj aparte invitis grupojn da kongresanoj por gastigi ilin kaj informi pri la Kongreso kaj pri Esperanto ĝenerale.

Raporto pri la Dua Ĝenerala Kunveno, kiu temis pri "La Internacia Lingvo kiel instrumento por eduko al internacia konceptado de la mondo", aperos en la venonta numero en la kadro de Lerneja Bulteno.

La Estraro kaj Komitato havis po 3 longaj kun-sidoj. Jen resumo de la decidoj faritaj:

Ĝenerale: Pro la ebleco, ke en Portland mankos la necesa kvorumo, la Komitato decidis okazigi novajn elektojn en 1971. Intertempe altiĝis la nombro de komitatanoj, ĉar en Vieno aliĝis al UEA Ĉeĥa Esperanto-Asocio (kun 1 100 membroj) kaj Irlanda Esperanto-Asocio (kun 30), dum ĵus re-aliĝis Korea Esperanto-Societo (kun 150). UEA havas nun 34 aliĝintajn landajn asociojn: nova rekordo. Samtempe la Komitato akceptis kontrakton pri kunlaboro kun ankoraŭ unu faka asocio: la nove starigita Espermenso, kaj decidis helpi al restarigo de Turisma Esperanto-Asocio kaj daŭrigi la helpon al Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista.

Varbado: La Estraro decidis plibonigi la varbadon de novaj membroj i.a. per eldono de afiŝoj pri UEA kaj ĝiaj eldonaĵoj por distribuo al landaj asocioj kaj lokaj grupoj.

Financo: Post detala pritrakto en komisiono, la Komitato aprobis la kontojn kaj buĝetojn de UEA kaj CED, kiuj aperis en la Dua Parto de la Jarlibro 1970, kiel ankaŭ la Estraran Raporton kaj Raporton de CED.

Periodaĵoj: La Estraro nomis f-inon Akiko Nagata, kiu lastatempe transprenis ĉiam pli multe da taskoj kaj respondecoj rilate al la oficiala organo, redaktoro de "Esperanto". La ĝisnuna redaktoro, d-ro Sadler, plue restas sur la posteno kiel ĉefredaktoro.

Kongresoj: La jam anoncita karavano de UEA el Eŭropo al la 57a UK en Portland (Usono) veturos 24 tagojn. La Komitato decidis sondi la interesiĝon pri dua, malpli longa (eble 10-taga), vojaĝo. Detaloj sekvos en "Esperanto". Responde al pluraj plendoj la Komitato krome decidis malebligi la prezenton de nacilingvaj filmoj kaj distribuon de nacilingvaj materialoj en estontaj UK-oj.

Junularo: Multan tempon dediĉis kaj la Komitato kaj la Estraro al la rilatoj inter UEA kaj TEJO, kiuj ne estas kontentigaj. La direktoro de la C.O. kaj s-ro U. J. Moritz, estrarano de UEA kaj de TEJO, ellaboros projekton de nova strukturo de la rilatoj inter UEA kaj ĝia junulara sekcio. Por junularaj delegitoj la Komitato decidis fiksi novajn aĝolimojn: de 16 ĝis 30 jaroj.

Lernejoj: Pro la revigliĝo de la faka asocio ILEI, la Estraro decidis malfondi la Konsultan Komisionon pri Lernejoj (KKL) kaj la oficon 'estrarano pri lernejoj', kiuj jam ne plu necesas.

Eldonaĵoj: La verkon "Brandt" de Ibsen, tradukitan de E. A. Haugen kaj eldonotan de Stafeto, la Estraro decidis akcepti en la serion "Oriento-Okcidento". Al la preparlaboroj de la nova Enciklopedio de Esperanto ĝi decidis doni novan subtenon per plua subvencio ĝis 200,— gld.

D-ro E. J. Görlich (Vieno), prelegante pri "Aŭstra literaturo kiel interligilo inter la popoloj", montris kiel plej diversaj kulturoj — kelta, germana, slavaj, hungara, latinidaj — influis la evoluon de la aŭstra literaturo kaj aŭstra kulturo. Kvankam germanlingva, la aŭstra literaturo estas ne germana, sed pli ĝuste germanlingve orienteŭropa.

Prof. d-ro Ivo Lapenna (Londono) skizis la "Atingojn kaj malsukcesojn de Unuiĝintaj Nacioj", okaze de la 25-jara datreveno de UN. Kiel aludite en la festparolado, la historio de UN prezentas apud nombro da efikaj agadoj kaj veraj progresoj senrevigan malsukceson sur la kampo de la konservado de la paco, en la efektivigo de la homaj rajtoj kaj en aliaj sferoj. Por pli efika rolo de UN necesas integriĝo homara.

Lektoro J. C. Wells (Londono), sub la titolo "Transforma-genera gramatiko", priskribis la nuntempe plej influrichan lingvosciencan teorion, tiun de Noam Chomsky, laŭ kiu la plej esenca trajto de la homa lingvo estas ĝia krea karaktero. La kapablo konstrui kaj kompreni frazojn neniam antaŭe aŭditajn nete distingas la homan lingvovozon disde la diversaj signalsistemoj de aliaj animaloj.

Prof. Lucien Laurat (Parizo) prelegis pri "Nacia kunvivado en la aŭstra-hungara ŝtato kaj ĝiaj paraleloj kun la nuntempa unuiĝo de Eŭropo", argumentante, ke nuntempaj politikistoj kaj ekonomikistoj devus lerni el la pozitivaj kaj negativaj spertoj de la iama Aŭstrujo-Hungarujo por eviti similajn erarojn en la novaj klopodoj pri unuiĝo de eŭropaj landoj.

D-ro Werner Bormann (Hamburgo) anstataŭis profesoron Dagys, kiu ne povis ĉeesti, per lekcio pri "Formoj de ekonomiaj integriĝoj, avantaĝoj kaj problemoj", en kiu li montris ne nur la profitojn,



1970

D-ro Eugen Wüster, rektoro de la Internacia Somera Universitato 1970, estas interalie specialisto de la Internacia Organizaĵo por Normigo (ISO, Ĝenevo) pri terminologio. Lia inaŭgura prelego "Internacia terminologio en la servo de la informatiko" konkludis, ke la revo pri universala vortarego komputile konsultebla el ĉiuj mondopartoj estas provizore tro giganta kaj ne realigebla sen internacia lingvo. La plena teksto de la prelego aperos en "La Monda Lingvo-Problemo" en la germana.



kiujn alportis merkataj unuiĝoj kiel EEK, la Konsilo por Reciproka Ekonomika Helpo, kaj Eŭropa Liberkomerca Asocio, sed ankaŭ la novajn problemojn, kiujn ili sekvigis. La prelegon sekvis vigla diskuto, i.a. pri agrikulturaj prezoj.

D-ro M. E. Falla (Britujo) starigis la demandon: "Kiel komputilo komprenas?". Per helpo de multaj bildoj kaj diagramoj d-ro Falla klarigis la proceson, laŭ kiu elektrona aŭtomato analizas frazon por 'kompreni' la informojn, kiujn ĝi enhavas. Tiu sama fraz-struktura analizmetodo estas aplikata sur diveraj kampoj, ekzemple en la permaŝina instruado de lingvoj kaj de aliaj objektoj.


D-ro István Szerdahelyi (Budapest) bazis sian pritrakton de la "Apliko de ekzaktaj metodoj en la didaktika kompar-lingvistiko" sur multjaraj eksperimentoj kaj esploroj. La moderna lingvoscienco ebligas preskaŭ ekzakte mezuri la "distancon" inter du lingvoj (ekz. la gepatra lingvo kaj iu fremda lingvo), tiel ke pedagogoj povas anticipi taksu la malfacilecon de la lernado kaj elekti lingvon plej konvenan por la instruado.

D-ro Hideo Shinoda (Japanujo) klopodis respondi la demandon, "Ĉu viro aŭ virino estas denaske

destinita?". Kvankam ĝenerale validas la principo, ke la sekson de ĉiu individuo decidas spermatozoo en la momento de koncipio, la kelkfoja apero de pseŭdo-hermafroditoj (kun internaj organoj de unu sekso sed eksteraj de alia) levas malfacilajn demandojn por la teoriistoj.

D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) relevis la temon "Universitato kun Esperanto kiel instrulingvo?" siatempe diskutita en Kopenhago en 1962. Li analizis la ĝisnunajn projektojn kaj konkludis, ke tia universitato en la normala senco estas neefektivebla en la nuna tempo, sed ke verŝajne post kelkaj jaroj estos eble starigi plursemajnajn universitat-nivelajn kursojn. Dum la Kongreso okazis aparta kunveno pri tiu temo.

Profesoro Gaston Waringhien (Francujo) ĉefaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro, prezentis siajn tiurilatajn spertojn kaj principojn sub la titolo "Leksikografiaj kaj leksikologiaj problemoj". La situacio de Esperanta vortaristo similas iom tiun de hindia aŭ nov-hebrea, kiu ofte devas mem adapti la vortaron al la bezonoj de scienco kaj tekniko. Recenzo pri PIV aperas aliloke en ĉi tiu numero, kaj la teksto de la prelego de ĝia ĉefaŭtoro aperos en posta numero de "Esperanto".



La 23-a Internacia Somera Universitato, en la kadro de la Universala Kongreso, konsistis el lekcioj de 10 universitataj profesoroj kaj aliaj kvalifikitaj personoj el sep landoj. Ne nur pli riĉa estis la programo, ol en la lastaj jaroj, sed ankaŭ alia: unufoje en Vieno la publiko havis okazon, post ĉiu prelego, fari demandojn kaj diskuton. Maldekstre: prelegintoj kaj prelegontoj de ISU kun la ĉi-jara rektoro. Laŭvice: prof. Lapenna, d-ro Wüster, d-ro Sadler, prof. Régulo, d-ro Neergaard kaj s-ro Wells.

Oratoroj kaj poetoj

Malgraŭ la partopreno de 38 aŭtoroj el 19 landoj per 88 konkursaĵoj, la rezultoj de la ĉi-jara Belarta Konkurso montras, ke la juĝkomisionoj estas malkontentaj pri la nivelo de la originala verkado. Eĉ en la plej elektata fako — la originala poezio — neniuj ricevis unuan aŭ duan premion. La poeziajn fakojn prijuĝis s-ino Contorno kaj s-ro Auld kaj Rotkviĉ, dum la prozajn branĉojn pritraktis s-roj Bernard, Rosbach kaj Venture. Ĉe la kunveno pri la Belarta Konkurso s-ino Heide deklamis sian propran verkon, kaj aliajn premiitaĵojn prezentis s-ino Lapenna, s-ro Bernard kaj s-ro Rytjkov.

Kontraste, la juĝkomisiono de la Oratora Konkurso (nun parto de la Junulara Tago) trovis la nivelon de la kvin konkursantoj laŭdirinde alta. Prijuĝis s-roj Pettyn kaj Thierry kaj d-ro Tonkin. Rezultojn vidu ĉi-sube.

Ĉiuj oratoroj elektis inter la temoj 3-a, 4-a kaj 5-a: "Aŭtoritatismo, demokratio aŭ anarkio en lernejoj", "Ĉu la lernejoj edukas la junularon por la estonteco?" kaj "Kion volas mia generacio?". Ili defendis siajn opiniojn inteligente, kvankam ili diris malmulton, kion oni ne jam povis koni el la publikigaĵoj de la 'revoluciaj' studentoj. Sed postulante pli, oni postulus eble tro multe. La oratoroj, kiuj parolis pri la temo 4-a, riproĉis al la instruada sistemo ĝenerale ĝian naciismon, ankaŭ ĝian troŝarĝon per fremdaj naciaj lingvoj. Tiuj, kiuj parolis pri la 5-a temo, akcentis, ke la junularo volas ŝanĝi la socion al plia egaleco kaj internaciismo kaj ke la pli aĝa generacio ne komprenas la junularon.

Krom diplomoj, ĉiuj premiitoj de la Belarta kaj Oratora Konkursoj ricevas monpremion: unua premio 100,— gld.; dua premio 70,— gld.; tria premio 40,— gld.

ORATORA KONKURSO: REZULTOJ

1. (Pokalo Ivo Lapenna) Duncan Charters (Usono)
2. Jo Haazen (Belgujo)
3. Iva Aberg (Svedujo)

BELARTAJ KONKURSOJ: REZULTOJ

Originala poezio

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. Nicolino Rossi (Italujo): "Misrenkontoj".

Laŭdo mencio:

Zora Heide (Danujo): "Vi al mi, mi al vi honore..."

Tradukita poezio

1. Prof-o Gaudenzio Pisoni (Italujo): "Rido de bela virino" de Gabriello Ghiabrera.
2. Nealjuĝita.
3. (1) Prof-o Gaudenzio Pisoni (Italujo): "Sur monto Marjo" de Giosuo Carducci.
(2) Masayuki Kuroda (Japanujo): "Ohiro" de Mokiti Saito.

Originala prozo

1. Nealjuĝita.
2. Nealjuĝita.
3. Andreo Szabó (Hungarujo): "Vojkurba renkonto".

Originala dramo

Premioj nealjuĝitaj.

Laŭda mencio:

Eduard V. Tvarozek (Ĉeĥoslovakujo): "La pendmaŝo".

Nova talento (Pokalo Harabaĝiu)


Adan Hryniewicz (Argentino), por traduko de la poemo "Se" de Rudyard Kipling.



Ne la ĉefa programero de la Internacia Arta Vespero estis la japanaj popoldancoj... Tamen ni ne hezitas doni al ili honoran lokon sur niaj paĝoj, ĉar la partopreno de pluraj dekoj da japanaj gejunuloj en la viena UK (krom nombro da pliaĝaj samlandanoj) ne nur konatigis al aliaj kongresanoj la trankvilajn muzikon kaj dancojn de Japanujo, sed ankaŭ alportis junecon kaj plian internaciecon al la tuta Kongreso. La plej fortajn — kelkfoje eĉ tro patosajn — efektojn de la Vespero donis la deklamado de Nikolaj Rytjkov, kiu prezentis i.a. la paroladon de Brutus el "Julio Cezaro" kaj la konatan interpreton de "Ezopa fablo" de Kalocsay. La programon kompletigis pluraj muzikaj eroj: de la bulgaraj gekantistoj Jordan Karagjosov kaj Maria Angelova (kantoj de Beethoven, Grieg, Schumann, Verdi k.a.), de pianisto Hans Wawrzik kaj violonisto Karl Grabner (Aŭstrujo). Bonhumore enkondukis la erojn LKK-ano Emil Vokal.

Teatro kaj aliaj artoj

Nur margene eblas raporti pri la ampleksa Aŭstra Vespero, kiu sub gvido de s-ro Emil Vokal konatigis la kongresanojn kun verkoj de Beethoven, Schubert, Mozart, Robert Stolz kaj Johann Strauss, kun popolaj kantoj kaj dancoj kaj kun la propre aŭstra muziko de t.n. Schrammel-kvarteto. Samcele estis prezentitaj i.a. filmoj pri Vieno kaj pri Aŭstrujo ĝenerale. Dudeko da personoj partoprenis aktive — kaj 200 pasive — la Debaton, ĉi-jare pri "Generacia konflikto — realaĵo aŭ preteksto". Ĉefdebatis: s-ro H. W. Holmes kaj Ivo Osibov.



Rondirado kun simplaj man-gestoj estas tipeco de la japanaj popoldancoj, kiujn eĉ mallertuloj tuj povas sekvi post kelk-minuta observado.

Ortodoksan viran dancon prezentas japana aktiva esperantisto s-ro Y. Umeda.



La ĉi-jara Teatra Vespero de la Universala Kongreso, dufoje prezentita, konsistis el du spektakloj: unuhora serioza monologo kaj, por kontraŭpezo, duhora bulgara komedio. La kombino de ekstremaĵoj garantiis, ke al preskaŭ ĉiuj kongresanoj plaĉis unu aŭ la alia parto de la programo.

La monologo "Sibilo", de la sveda aŭtoro Pär Lagerkvist, jam ricevis unuan Esperantan realigon en la dana landa kongreso antaŭ kelkaj monatoj. Sibilo estas antikva profetino. Tra la monologo disvolviĝas antaŭ la spektantoj la tuta tragedia historio de junulino devigita al tiu ofico, dediĉita al iu dio, kies ekziston ŝi ne sentas. Idilie rakontita renkontiĝo kun homa amanto kondukas al gravediĝo. Nur post tiu sperto ŝi sentas sin posedita de la dio, kiun ŝi suspektas pri la murdo de la amanto. Elpelita el la templo, ŝi fuĝas al soleca montaro, por tie naski — kretenon.

Sentigi al la spektantoj la universalan enhavon de tiu temo, kunsentigi kaj emocii ilin dum unu horo, tio ne estas tasko facila por unu sola aktorino, simple vestita, sen apartaj scenaroj kaj helpate nur de (cetere tre impresaj) muzik-fragmentoj. Sed tiun taskon frontis kaj superis

la pola aktorino Karina Waŝkiewicz. Ŝia intensa energio kaj la majstra manipulado de la malfacila teksto kaptis kaj retenis ĉies atenton.

"La virina regno" de bulgara aŭtoro S. L. Kostov (1879-1939) rekondukis sur la internacian scenejon la Bulgaran Esperantan Teatron organizitan de Kiril Drajev. La aŭtoro metas nin antaŭ bulgaran vilaĝon, en kiu inversiĝis la roloj de viroj kaj virinoj. El tiu sola ideo li ĉerpas ĉion ridigan: junulo koketas knabinece, jupe vestitaj patroj vartas ploraĉantan bebon, pipfumantaj vilaĝaninoj direktas la komunumajn aferojn, ktp., ktp. Sed per la subpremiteco de la viroj li bonhumore demandas ilin pri la justeco de la kontraŭo.

En la 15-persona trupo troviĝis abundo da aktoraj talentoj, kiel atestas la titoloj "merita aktoro", "popola aktorino", k.s. Bedaŭrinde la manko de provludo en Vieno (pro dogana malfruiĝo) sentiĝis en la ofta malstrikteco kaj malrapido de la aktorado, kaj la forte bulgara elparolo de unuopaj rolantoj kelkfoje ĝenis la komprenon. Entute tamen, la surscenigo de tiu plaĉa komedio, inter okulfrapaj, buntaj dekoracioj, en bonstila traduko kaj en plenumo de unuarangaj aktoroj devas rangiĝi inter la pli sukcesaj realigoj de la jam 12-jara BET.

Intervjuo kun du kongresanoj



Jo Haazen,
aktivulo de la
loka movado en
Antverpeno, ĉe-
estis la duan
fojon en Uni-
versala Kongreso.



Simo Milojević,
antaŭe redaktoro de
La Suda Stelo,
volus vidi pli
altnivelan
kulturan programon.

Kiel vi komparas la 55an Universalan Kongreson kun aliaj, kiujn vi ĉeestis?

Haazen: La 55a U.K. estis la dua mondkongreso, kiun mi ĉeestis. Tamen mi ne volas kompari ambaŭ manifestaciojn unu kun la alia, ĉar la unua okazis en nefacilaj cirkonstancoj (Tel Aviv-Rotterdam), kaj la dua pasis sen menciindaj obstakloj. La viena kongreso laŭ mi brile sukcesis, kaj la organizintoj meritas sincerajn laŭdojn.

Milojević: Oni ja povas firme ligiĝi al la Movado eĉ sen ĉeesti la kongresojn. Tamen, la viena kongreso estis por mi ĉiukaze plia sperto pozitiva; okazo por manpremi nomojn, kiuj pli ol jardekon rolas en miaj laboroj, kaj tio ja estas plej ofte agrabla.

Laŭ la kongresa regularo, la Universala Kongreso estas "internacia manifestacio de la Esperantistaro" kaj "celas fortigi la solidarecon inter la esperantistoj, progresigi la movadon kaj studi ĝiajn problemojn". Ĉu la 55a respondis al tiuj celoj? Kiel la estontaj kongresoj povus pliprosimigi ilin?

Haazen: Mi sincere kredas, ke la ĵus pasinta kongreso kreis sufiĉe favorajn kondiĉojn por kreskigi la interesojn de la esperantistaro kaj por stimuli ĝian agadon. Ĝi sendube fortigis la solidarecon inter tiom da bonvolaj homoj. La koncepton "solidareco" mi deziras speciale substreki, ĉar ĝi estas ege grava precipe por daŭre batalantaj movadoj kiel la nia. Sen solidareco ni perdas fortojn, kiujn ni vere bezonas por efike labori kaj por respektigi nian agadon. Ĉu la kongreso progresigis la movadon, tion ni povos nur konstati poste. Efektive, multaj esperantistoj pristudis organizajn problemojn kaj ideojn, sed nuraj studoj kaj ekzamenoj ne sufiĉas. Nun ni devas AGI, TRAFE AGI, prefere laŭ tiuj metodoj, kiujn aliaj sukcesantoj aplikas.

Pri la venontaj kongresoj mi povas nur esperi, ke ili ĉiam estu bone organizitaj, ke ĉiam regu bona atmosfero, ke ili ĉiam disradiu june freŝan spiriton.

Milojević: La Kongreso certe estis impona manifestacio de la Esperantistaro kaj ĝi sendube kontribuis ne nur al la solidareco inter la esperantistoj, sed multe pli larĝe — al la solidareco inter la homoj, inter la popoloj. Ĝi estas okazo por resumi la rezultojn de la Movado, sed iom tro brua medio por studi la problemaron. La atingoj de pli bonaj rezultoj tiurilate dependas multe pli de la kongresanoj ol de la kongresorganizantoj.

Oni kutimas disdividi la kongresajn programojn en tri grupojn: laboraj aranĝoj, kulturaj aranĝoj kaj festaj aranĝoj. Ĉu laŭ via opinio ekzistas ĝusta ekvilibro inter tiuj tri grupoj, aŭ ĉu necesus pli emfazi tiun aŭ alian?

Haazen: Evidente mi ne povis ĉeesti ĉiujn programojn. Mia opinio do ne rilatas al ĉio, kio okazis. Laŭ mi estis bona ekvilibro inter laboraj,

kulturaj, kaj festaj aranĝoj. Ĝenerale mi konstatis grandan laboremon, multe da bona volo kaj optimismo. Iuj aranĝoj estis eksterordinare bonaj, aliaj estis tro diletantaj kaj ne akiris la deziratan nivelon. Ni devas ĉiam bone konscii pri tio, ke la hodiaŭa publiko estas ege postulema pro tio, ke ĝi preskaŭ ĉiutage konfrontiĝas kun plej altnivelaj programoj. Tio signifas, ke, se ni ne sufiĉe altkvalitigas nian laboron, ni mem ridindigas nin. Rilate la lastan demandon mi pensas, ke ne necesas emfazi tiun aŭ alian grupon, ĉar ĉiu havas apartan valoron. Ni atentigu precipe pri la ĝenerala taŭgeco.

Milojević: La kongresa programo estis absolute plenŝtopita kaj relative varia. Oni ja ne dividas sole la kongresajn aranĝojn en tri grupojn, sed oni povas ankaŭ la kongresanojn disdividi en almenaŭ dekon da grupoj kaj paroli pri: kunsidaj, amuziĝemaj, ISU-aj, ekskursaj, ĵupĉasaj kaj aliaj specoj de kongresanoj. Ĉiu el tiuj grupoj troige sekvas siajn emojn, kvankam — ebleco por ekvilibro ekzistas ja.

Kio plej plaĉis kaj kio plej malplaĉis al vi persone en la 55a UK? Kial?

Haazen: Plej plaĉis la impona oficiala kaj grandioza inaŭguro, kun kelkfoje kortuŝaj momentoj. Nur la salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj estis tro longaj. Ni ne ripetu tiun eraron, ĉar eminentuloj, diplomatoj kaj ambasadoroj ne venas al inaŭguro por aŭskulti tiel longajn — kaj tial ne plu efikajn — salutojn. Ni ne forpelu ilin!

Milojević: Kredeble ne nur por mi, pleje plaĉa estis la vigleco, kiun al la kongresa programo aldonis la "Junulara Tago". Mi neniel celas la programeron "junularo provokas", kiu ja estis misuzita okazo kaj perfidita ŝanco eksponi al la "pliaĝuloj" la sencon de la junularaj rezisto kaj ribelo. Tiu programero ŝajne estis bone planita, sed mise gvidita, kio fine kondukis al la preskaŭ kutima uzo de privataj "argumentoj", kio per si mem estas la blanka flago. Sed, se mi voĉdonas pleje por la "Junulara Tago", devigas min al tio la publika Komitat-kunsido de TEJO, la "Junulara Vespero" kaj pli ol ĉio alia — la sekvintan tagon okazinta, ĉarma, efika, kultura, eksterprograma ŝtupar-okupo en la kongresejo. Se paroli pri malplaĉo, mi mencias la "Literaturan recitalon" de N. Rytjkov. Mi ŝatis lian arton, des pli tiun de Soljenjicin, sed kio malbongustis, estis la tro longegaj kaj tro tendencaj komentoj de la aktoro. Tre plaĉa la kongresejo interne, sufiĉe aĉa de ekstere.

Ĉu vi volus ion aldoni, iajn personajn rimarkojn?

Milojević: Mi volonte aldonas pledon por pli altnivela kultura programo en la sekvantaj kongresoj. Oni ja devus iom pli atenti la guston de tia amaso de du mil kongresanoj. En la kultura programo de la viena kongreso, escepte de kelkaj eroj en la "Aŭstra Vespero" kaj unu aŭ du en la "Internacia Arta Vespero", apenaŭ estis io atentinda.

Tre internacia estis la Infana Kongreseto

Post trijara interrompo, la tre sukcesinta 11-a Internacia Infana Kongreseto firme restarigis tiun valoregan parton de la kongresa programo. Dank' al intensa, sed elektema varbado, ne nur kunvenis maksimuma nombro da infanoj, sed ankaŭ la lingva nivelo kaj la internacieco estis garantiitaj.

Tridek naŭ infanoj el dek du landoj formis unu-semajnan familian rondon sen landolimoj kaj sen lingvaj baroj, nome la 11-an Internacian Infanan Kongreseton. La lingva kono de la infanoj, el kiuj triono estis denaske esperantolingvaj, ĝenerale estis tre bona. Nur unu knabo kompensis mankantan lingvokonon per korpa aktiveco.

Dum iliaj gepatroj aŭ parencoj okupiĝis pri la Universala Kongreso, kiu okazis paralele kun la Infana Kongreseto, la infanoj (6-13-jaraj) estis sekure amuziĝantaj, zorgate de 5 taŭgaj gvidantoj el diversaj landoj.

La kongresejo por la infanoj estis la Internacia Kulturejo Hörndlwald (Vieno), kiu estas ĉirkaŭita de bonaj atmosferaj kondiĉoj. Granda herbejo kaj naĝbanejo ĉiam estis je ilia dispono, kio estis granda avantaĝo, precipe en varmega vetero kiel dum la tuta kongresa semajno.


Invititaj de la Urbestro

La unuan tagon de la Kongreseto, la interkona vespero ne longe daŭris pro lalaceco de la infanoj, kaj la gvidantoj preparolis la programerojn post ilia enlitiĝo.

La duan tagon, la infanoj veturis aŭtobuse al Stadthalle, kie estis okazonta la inaŭguro de la 55-a UK. Kvankam multaj kongresanoj ĉeestantaj la inaŭguron tion ne bone aŭdis nek bone vidis, hungara kaj franca knabinoj kaj germana kaj jugoslava knaboj salutis la ŝtatprezidanton Franz Jonas, deziris al li "agrablajn kongrestagojn" kaj transdonis florbukedon al li.

Inter la programeroj de la Kongreseto estis vizitoj al parko Prater, kastelo Schönbrunn, kiu enhavas ankaŭ parkon kaj bestoĝardenon, kaj al la urbodomo de Vieno. La urbestro invitis la infanojn al aŭtobusa ekskurso tra la urbocentro kaj al posta regalo en la urbodomo.

Tombolo estis ĝojiga programero. Ĉiu infano ricevis unu aŭ du objektojn, kiujn kontribuis kelkaj el la gvidantaro kaj viena banko. La infanoj vidis



ankaŭ filmojn pri Aŭstrujo ktp.

Ne nur pasive sed ankaŭ aktive ili partoprenis programerojn. Ili skribis siajn taglibrojn, cerbumis, kion prezenti en la teatra vespero..... Kun la ĉeesto de la gepatroj kaj libervolaj vizitantoj, la infanoj ne ludis teatraĵojn, sed montris, kion ili faris dum la Kongreseto. La gepatroj povis konstati, ke la gvidantoj tre bone kreis gajan, vigan kaj harmonian internacian societon.

Infanoj helpis la gvidantojn

La ĉefgvidanto s-ro J. Wesian bone organizis la Kongreseton kun la helpoj de la aliaj gvidantoj s-inoj M. Marischler kaj S. Šalamon, f-ino B. Koopmans kaj s-ro J. Hengstmengel. La lastaj du estas ankoraŭ tre junaj, kaj pli grandaj knabinoj el la infanoj helpeme apogis ilian laboron.


Ankaŭ pri la estro de la kongresejo Hörndlwald oni estas tre kontentaj, dirante, ke la infanoj ricevis 5 manĝojn tage kaj havis eblecon preni pli grandan porcion.....

Dankata estas ankaŭ la kuracisto, kiu estis vokita vespere kaj nokte plurfoje kaj kiu ne akceptis honorarion krom donaceton de Esperanto-sondisko.

Ne estas forgeseble, ke ankaŭ por la 11-a Kongreseto funkciis la fondaĵo "Adoptaj Gepatroj", kiu estas por infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nebonstataj familioj. Ĉi-foje 4 geknaboj el nepagipovaj landoj partoprenis kiel invititoj de la Adoptaj Gepatroj. Ili estis tre ĉarmaj kaj bonege parolis Esperanton.

La ĉefa celo de la Infanaj Kongresetoj eduki infanojn al internacia amikeco per aplikado de la Internacia Lingvo estas sendube atingita iugrade ankaŭ en ĉi tiu Kongreseto. Estas dezirinde, ke ĉiam pli multnombro infanoj ĉeestu la Infanajn Kongresetojn, kio mem estas unu el la gravaj faktoroj por sukcesigo de tiuspecaj kongresoj.

Pri la Kongreseto oni raportis per radio dum la semajno.



Profesoro Lapenna alparolas la Kongreson dum la Solena Fermo. Sur la podio aŭskultas (de maldekstre): la prezidanto de TEJO d-ro Tonkin; LKK-prezidanto d-ro Grimme; estraranoj Thierry, Wensing kaj Becker; d-ro Sadler; s-ro Nevan; la prezidanto de la Akademio prof. Waringhien; estraranoj Woessink kaj Moritz.

Omaĝoj ĉe la Solena Fermo

Ankoraŭ granda nombro el la 1987 anoj de la 55-a Universala Kongreso partoprenis sabate la Solenan Fermon.

Per sia enkonduka raporto pri la dumkongresaj laborkunsidoj, la ĝenerala sekretario montris, ke "la viena Kongreso ne nur dancis, festenis kaj ĝuis kulturajn programerojn, sed ankaŭ efike laboris". La du rezoluci-proponojn de la Komitato (vidu p. 130-131) la ĉeestantoj akceptis unuanime. Al Rezolucio II la prezidanto aldonis ankoraŭfojan instigon varbi abonojn por la revuo "La Monda Lingvo-Problemo" ĉe universitataj bibliotekoj, sciencaj institucioj k.s., ĉar "en scienca mondo ni bezonas multe da sciencaj argumentoj por pruvi, ke ni pravas". La varman aplaŭdon li interpretis "ne nur kiel aprobon, sed ankaŭ kiel decidon agi laŭ tiu instigo".

Profesoro Lapenna gratulis al Sennacieca Asocio Tutmonda kaj al prof. Gaston Waringhien, kiel respektive eldoninto kaj ĉefaŭtoro de la nova Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, aperinta tuj antaŭ la UK kaj mendebla dum la tuta semajno ĉe la libroservo de la Kongreso. La vortaro, li diris, prezentas la rezulton de 20-jara laboro, en kiun la nuna prezidanto de la Akademio metis sian tutan talenton, laboremon kaj kleracon. Ĝi markas ne etapon, sed novan eraon en la evoluo de la lingvo, precipe de la faka vorttrezoro.

Aparte forta aplaŭdo sekvis la informon, ke prof. Lapenna kiel prezidanto de UEA ĉeestis kaj salutis la ĉi-jaran kongreson de SAT.

Prenis la parolon s-ro Becker por prezenti al reprezentanto de Pola Radio, en la nomo de la Estraro de UEA, donacan ekzempleron de PIV kiel rekonon de ĝia grava kontribuo por evoluigo de la ĵurnalisma lingvaĵo en radio. "La 20an de aŭgusto okazos la 5000-a elsendo de Pola Radio en Esperanto — je la 06h30, kiam bonaj esperantistoj vekiĝas kaj enŝaltas la radioaparaton!" Li gratulis ankaŭ al Radio Vieno, kies elsendojn prizorgis jam dum 25 jaroj s-ro E. Vokal.

Al la 56-a UK en Londono invitparolis la prezidanto de la tiea LKK, s-ro John Wells.

Post ĉiufankaj dankoj al LKK Vieno kaj aliaj, la finajn vortojn eldiris vicprezidanto s-ro Wensing: "Vi, kongresanoj, ne kredis ke, en la sino de la Estraro, ĉiam ĉio iras glate. Sed la honesta vort-skermado ĉiam kondukas al proponoj kaj decidoj, aŭ kompromisoj, por ĉiuj akcepteblaj. Singarde pesante la argumentojn, pacience aŭskultante ĉies opinion, nia prezidanto firmanime gvidas la debatojn laŭ ordigita maniero. Profesoro Lapenna, mi dankas al vi pro via senlima oferemo, pro via neimitebla gvidado, pro viaj elstaraj meritoj por nia movado, sed ankaŭ pro la eraroj, kiujn vi — kiel ĉiu homa kreaĵo — kelkfoje faras. Koregan dankon kaj fartu bone!"

Plena Ilustrita Vortaro jam aperis!

Sennacieca Asocio Tutmonda anoncis el Parizo en la 10-a de julio 1970 la aperon de Plena Ilustrita Vortaro, la monumenta (37 + 1299 paĝoj) verkego ekkompostita kaj grandskale antaŭmendita jam antaŭ du jaroj. Komence de septembro, la kunlaborantoj de SAT finis la ekspedadon de preskaŭ 2 000 ekzempleroj al tiuj, kiuj antaŭpagis la volumon je favora prezo. Laŭ la anonco de SAT, ekde oktobro 1970 la Vortaro estos libere aĉetebla, tiam je la plena prezo: 94,— gld. inkluzive de sendokostoj.

Kiel aspektas la nova vortaro? Ĝi estas granda, sed ne tro. Proksimume 20 × 14 cm. alta kaj larĝa, ĝi estas ankaŭ 6 cm. dika (verŝajne la plej dika libro ĝis nun aperinta en Esperanto). Fortike tolbindita, ĝi estas facile tenebla per unu mano. La aspekton de la teksto mem niaj legantoj jam povis konstati laŭ la fragmento reproduktita sur p. 63 de la aprila "Esperanto".

Kiu posedas Plenon Vortaron de Esperanto, tiu eble demandas sin, en kio konsistas la ĉefaj diferencoj inter PV kaj PIV, kaj ĉu vere li bezonas aĉeti la novan vortaron. Kontraŭe al la impresoj, kiun donas la titoloj, la ĉefa diferenco ne estas la ilustraĵoj. Ili konsistas el 30 paĝoj da desegnaĵoj ĉe la fino de la volumo, kun pliaj 30 paĝoj da klarigoj pri la bildoj. La bildoj estas laŭteme aranĝitaj, ekzemple Birdoj, Homa anatomio, Muzikiloj, ktp. Ili formas interesan kaj instruon tuton, sed ne estas esenca elemento. La samon oni povus diri pri la diversaj tabeloj, kiuj ne troviĝis en PV: Kemiaj simboloj; Mallongigoj; Geologiaj tempoj; Sistematikaj grupoj en zoologio; Prahistoriaj kulturperiodoj; k.a.

La ĉefa diferenco inter PV kaj PIV estas progreso kvanta kaj kvalita.

Kreskis tiel la nombro de artikoloj, t.e. de vortoj registritaj, kiel ankaŭ la amplekso de la difinoj.

Se preni ekzemple la literon D: en PV aperas 386 artikoloj, en PIV jam 650. La tuta amplekso de la teksto en la nova vortaro estas preskaŭ la trioblo de tiu en Plena Vortaro kaj Suplemento. La artikoloj pri, ekzemple, DA kaj DE kreskis je respektive 40 kaj 20%.

Analizo de unu litero

Kion signifas tiu kresko? Ĉu novan invadon de nenecesaj neologismoj? Ĉu ĝeneralan komplikadon de la vort-uzado? Ni rigardu, kio aldoniĝis. Se preni denove unu solan literon kiel ekzemplon, ni trovas, ke sub Ĉ aldoniĝis 39 novaj artikoloj. El tiuj 39, unu triono estas nomoj geografiaj aŭ naciaj, kiujn siatempe principe ellasis la aŭtoroj de la malnova PV: Ĉado, Ĉampanjo, Ĉangĉun, Ĉangdu, Ĉeĥio, Ĉerburgo, Ĉerkeso, Ĉeviot, Ĉikago, Ĉilio, Ĉimborazo, Ĉino, Ĉongking. Aliaj 5 estas vortoj kun nacia aparteco: ĉardo kaj ĉardaŝo (hungaraj), ĉervonco (rusa), ĉibuko (turka), ĉirimenjo (japana). Aperas 1 persona nomo: Ĉarlota. El la ceteraj novaj enskriboj, la granda plimulto estas fakaj: ĉampinjono, ĉerimolio, ĉiro (botanikaj); ĉifĉafo, ĉiko, ĉinĉilo (zoologiaj); ĉalazio (medicina), ĉaleto (konstruteknika), ĉanto (muzika), ĉatobriando (kuirarta), ĉeleo (prahistoria), ĉentono (beletra), ĉiklo (kemia), ĉuko (teknika). Iel fakaj estas ankoraŭ 3: ĉenilo (ŝtofo), ĉimozino (fermento) kaj ĉizojo (fortika tondilo). Tiam restas nur ĉ (la litero mem), la interjekcio ĉit! (= silentu!) kaj ĉuro (spermo — kun signo, ke temas pri neologismo).

El tiu prova analizo de nur unu litero de la alfabeto estas jam klare, ke neniel temas pri vasta enkonduko de nenecesaj vortoj. Ja la geografiaj kaj naciaj nomoj plejparte jam ekzistis, sed nur ne aperis en PV, dum pri la bezono vastigi la teknikan vortprovizon apenaŭ iu povas dubi.

Kompletigo kaj precizigo

Kiam temas pri vortoj jam registritaj en PV (ekzemple la menciitaj artikoloj pri DA kaj DE), la ampleksigo konsistas parte el la aldono aŭ kompletigo de ekzemploj kaj citaĵoj, parte el precizigo de la difinoj, eventuale per aldono de novaj rimarkoj pri la uzado. Ĉe DA, ekzemple, ni trovas novan rimarkon, ke oni ne uzu ĝin antaŭ la vortoj 'ĉiuj' kaj 'tuta'. Tio ial mankis en PV. La novaj aldonaĵoj ne signifas, do, komplikadon de la vortuzo, sed male pli bonan ilustradon de la uzo kaj forigon de duboj kaj miskomprenoj.

Kvalita plibonigo estas la ĝustigo de la ekzemploj cititaj kiel zamenhofaj. En PV la ekzemploj el verkoj de Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj estis ofte koncizigitaj, tiel ke ili fakte ne plu estis tute aŭtentikaj. Atesto pri la skrupula respekto estas, ke li "relegadis, kun la krajono en la mano, ĉiujn liajn verkojn, precipe esplorante tiujn, kiuj estis

(daŭrigo al p. 142)



Momento neformala antaŭ la Solena Inaŭguro:
Prezidanto Jonas kun (maldekstre) KKS Nevan kaj
sia frato Ludwig Jonas (vicprezidanto de LKK) kaj
(dekstre) la prezidanto de UEA prof. Lapenna.



Andrzej Tomecki, konata aktoro kaj kanzonisto de la polaj radio kaj televido, ellaboris unupersonan spektaklon pri Varsovio. Li planas prezenti la programon en Esperanto dum plurlanda vojaĝo, kiun organizas Pola E-Asocio.

FAKE

Botaniko

- En scienca revuo "Taxon", eldonata de la Internacia Oficejo por Klasifiko kaj Nomenklature de Plantoj (Utrecht, Nederlando), aperis propono de Ralph A. Lewin, ke la formalaj priskriboj de ekster-teraj plantoj — se iam oni trovos tiajn — estu en Esperanto.

Ĉifrado

- "The American Cryptogram Association" estas asocio unuiganta 600 ĉifro-amatorojn, ne nur en Usono, sed en la tuta mondo. Ĝia oficiala organo "The Cryptogram" publikigas ĉifrojn por solvado, de simplaj ĝis plej komplikaj. Ĉifroj en Esperanto aperas regule flanke de aliaj gravaj lingvoj. Ĉifroanaliza terminaro en la Internacia Lingvo estas preparata.

Komerco

- En la ĉijara Foiro de Barcelono, festanta la 50-jaran datrevenon de ĝia unua Foiro, aperis Esperanta stando imitanta tiun de la 3a Foiro en 1922.

Lingvo

- Lastatempe en Usono ekaperis propaganda periodaĵo "English: Around the world" (La angla lingvo: Tra la mondo), eldonata de la Angleparola Unuiĝo de Usono kun celo fari la anglan dua lingvo por la mondo.

Ortografioj

- La unua Monda Kongreso por la Unuecigo de la

Skribo okazos ne ĉi-jare, sed nur en 1972 (20-24 sept.). Tiun prokraston decidis la organizanta instanco, Katolika Universitato de Campinas, Brazilo. En la kongreso (detalojn vidu en "Esperanto", marto 1969, p. 43) reprezentiĝos ankaŭ UEA.

LOKE

Ĉeĥoslovakujo

- El Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo kaj Pollando partoprenis 75 personoj Someran Esperanto-Lernejon, okazintan en julio en sudslovaka banregiono Dudince. La Lernejo tiel sukcesis, ke oni havu la saman ĉiujare en Dudince.

Eŭropo

- En la 11-a de oktobro 1970 okazos en Valkenburg (Nederlando) Trilanda Renkontiĝo de Esperantistoj, ĉefe el la belga, germana kaj nederlanda limregionoj.

Finnlando

- La Universitato de Helsinki decidis daŭrigi Esperanto-kurson sub gvido de magistro V. Setälä post la morto de prof. V. Väisälä. La kostoj de la kurso, komenciĝinta en aŭtuno 1968, estis pagitaj de prof. Väisälä mem, sed ekde ĉi tiu aŭtuno estas pagotaj de la Universitato mem.

Francujo

- La kampado okazinta en Balaruc le Bains, kvankam malgrand-skala kun 35 personoj, rezultigis, ke oni nomis la kampadejon "Stelo" kaj unu straton "Strato Zamenhof" kaj eldonis Esperantajn faldfoliojn, sub konsento de la urbestro.

Hispanujo

- De post aprilo, Hispana Esperanto-Muzeo en Villafranca del Panades estas registrita en la ĝenerala direkcio de belartoj — fako de la hispana ministerio pri edukado kaj scienco — kiel kultura institucio en formo de muzeo.

Hungarujo

- En la uzina bild-revuo "Orion újság" (Budapest) komenciĝis la 1an de majo 12-monata ilustrita Esperanto-kurso. Jam de 1963 la revuo regule informadas pri la Internacia Lingvo.

Israelo

- Tridek kursanoj partoprenas kurson por instruistoj kaj direktoroj de arabaj lernejoj en Jerusalemo. Instruas Moŝe Savir kun helpo de Jusuf Anastas.

Japanujo

- La 57an Kongreson de Japanaj Esperantistoj, okazintan apud Oosaka lige kun la Universala Ekspozicio 1970, partoprenis 825 personoj. La kongresurbo subvenciis la Kongreson per sumo de 300 mil enoj (t.e. 3 000 gld.), kaj ĉiu gubernio iel subvenciis, kvankam plejparte morale.

Jugoslavio

- En la 19a Jugoslavia Esperanto-Kongreso en Niš, okazinta en julio, 50 el cento da kongresanoj ĉeestis la fakkunsidon de jugoslaviaj UEA-membroj.

Kanado

- D-ro H. Unger el Svislando, redaktoro de "Turista Mondo", parolis la 17an de junio en intervjuo en la Kanada Radio en Montréal pri sia revuo, pri la delegita reto de UEA, pri la rolo de Esperanto en turismo kaj pri turismo en Svislando.

Kongo

- En Bukavu, Dem. Resp. Kongo, okazis duhora

prelego pri Esperanto de s-ro Marc Delforge, sub aŭspicio de la Universitato Lovanium kaj de la guberniestro de Kivu. Ĉeestis 250 studentoj kaj 2 lernejestroj.

- Sekve al la artikolo pri "Ĵamborea lingvo" (Esperanto, jul-aŭg. 1969, p. 115), kurson por 18 skoltaj gvidantoj organizis Karel Braet. Kongo sendos fortan delegacion al la ĵamboreo en Japanujo en 1971.

Koreujo

- Dek-sep-persona grupo el Tokio vizitis Koreujon komence de majo 1970, kaj okazis kuraĝigaj renkontiĝoj kun koreaj esperantistoj. Ekde aŭgusto 1971 (en Seulo), okazos ĉiujara unusemajna renkontiĝo korea-japana.

Pakistano

- La registaro de Pakistano decidis por ĉiuj celoj pozitive uzi la urduan kaj bengalan lingvojn kiel la oficialajn ekde 1975. Kvankam la du lingvoj estis deklaritaj kiel la lingvoj por la nacio en 1954, ĝis nun la angla lingvo daŭre funkciis kiel oficiala lingvo.

Usono

- La Universitato Fort Lauderdale en Florida decidis ŝanĝi sian nomon al "La Internacia Universitato" kaj instigi la instruadon kaj lernadon de Esperanto. Ĝi varbas studentojn tra la mondo.

- Esperanto-kurso por elementaj lernejoj en Havajo estas enkondukita en 16 klasojn de la 4a, 5a kaj 6a gradoj en 8 urboj. Venontjare la nombro de la klasoj duobliĝos.

- La Ŝtata Kolegio en Sanfrancisko, Usono, unuafoje starigis oficialajn Esperanto-kursojn dum ĉi tiu somero kaj invitis kiel instruiston s-ron William Auld el Skotlando. Partoprenis la kursojn 53 personoj, ankaŭ el Kanado kaj Japanujo. La studentoj uzis la lingvo-laboratorion de la Kolegio kaj, post ekzamenoj, ricevis universitatajn poentojn. William Auld aperis fine de julio en televida diskutprogramo, kiun spektis ĉ. 200 000 personoj.

Plioftiĝas vizitoj de japanoj al la najbara Koreujo. Jen profesoron Yoŝio Koseki el Tokio (dekstre) kun interesiĝo bonvenigas (de dekstre) prof. Haechung Choi, eksprezidanto de Universitato Chunggu, Taegu; s-ro Bongkil Kang, instruisto; s-ro Chongha Lee, dekano de jura fakultato de Univ. Young Nam, Taegu.



- Sekve al kunlaboro inter la inteligentula organizaĵo MENSA kaj UEA, Esperanto Inform-Centro de ELNA starigis Esperanto-ekspozicion en la landa kongreso de MENSA en Philadelphia, 20 junio 1970.

Vjetnamujo

- En Hanojo okazis lastatempe jarkunveno en la Esperanto-Klubo de Hanojo, strato Trang Thi (la ĉefa strato de Hanojo), n-ro 65. Partoprenis hanojanoj kaj ankaŭ multaj el aliaj urboj. Inter la ĉeestantoj elstaris ministro de kulturo Hoang minh giam, ministro kaj vicministro pri klerigo Nguyễn van huyên kaj Hô trúc, ministro pri trafiko kaj transporto Phan trong tuê kaj la prezidanto de la komitato por kulturaj rilatoj kun eksterlando, Pham ngoc thuân.

PERSONE

Berggreen

- Frontante la venont-jaran Mondan Ĵamboreon en Tokio, la nove elektita prezidanto de Skolta Esperantista Ligo s-ro J. Berggreen alvokis al la membraro de SEL fari plian paŝon al alpreno de la Internacia Lingvo fare de la skoltaro, kiu konsistas el pli ol 20 milionoj da personoj en pli ol 100 landoj.

Cseh

- La 12an de septembro fariĝis 75-jara Andreo Cseh, la fondinto de Internacia Esperanto-Instituto en Hago kaj kunfondinto de Universala Ligo.

Markarian

- En septembro al japanino Kimie Ozawa edziĝis aktiva komitatano s-ro Raif Markarian, kiu estas delegito kaj fakdelegito en Brentwood, Britujo.

Nekrologoj

BOZIDAR VANČIK (1909-1970)

Bozidar Vanĉik, delegito en Varazdin, Jugoslavio, forpasis la 23-an de majo. Li estis elstara poeto, tradukisto kaj lingvisto, konata en Kroatujo ankaŭ ekster la Esperanto-movado. Li kontribuis ĉefe al "Literatura Mondo", "Internacia Kulturo" kaj "La Suda Stelo", kaj de la du lastaj li estis kunredaktoro.

AMÉLIE MONTANDON

La 2-an de majo mortis en Svisujo s-ino Amélie Montandon, malnova membro kaj delegito de UEA, 89-jara. Ŝi aktivis en la movado ekde la 2a UK en 1906 ĝis nelonge antaŭ la morto.

OTTO BRANDT (1891-1970)

Post mallonga malsano mortis, komence de junio, Otto Brandt (Krefeld, FR Germanujo). Li lernis Esperanton antaŭ 50 jaroj kaj estis malnova membro kaj fakdelegito de UEA por blinduloj.

GEORGO LEO PIVAC (1906-1970)

Forpasis en la 26a de junio jugoslav-devena novzelandano G. L. Pivac, delegito de UEA, en sia naskiĝlando Jugoslavio, dum vizito.

Pola Radio jam 5000 fojojn en Esperanto



La 4-an de aprilo, en la jaro 1959 unuafoje aŭdiĝis en la etero la anonco: "Parolas Varsovio, naskiĝ-urbo de Esperanto!" De post tiam la signalo de la Esperanto-disaŭdigoj de Pola Radio sonis jam 5 mil fojojn. La 20-an de aŭgusto en la nuna jaro, je la 6.30 horo matene, Pola Radio disaŭdigis la 5000-an elsendon en la Internacia Lingvo.

En la 1969-a jaro la Esperanto-redakcio de Pola Radio festis la 10-jaran jubileon. Tiukaze estis aranĝita la jubilea konkurso, en kiu partoprenis pli ol 2000 esperantistoj. Sekve, en aŭtuno de la 1969-a jaro, kvar esperantistaj laŭreatoj senpage vizitis Pollandon kaj estis gastoj de la Pola Radio.

Lige kun la 5-mila elsendo okazis neniuj konkurso kun premioj. Tamen la jubileo fariĝis okazo por aranĝo de malgranda enketo inter la esperantistaj aŭskultantoj kaj inter ĉiuj interesitaj gesamideanoj. De post la 20-a de aŭgusto ĝis la fino de la nuna jaro la Esperanto-redakcio disaŭdigas en la programero "Leterkesto" la respondojn je la tri jenaj demandoj:

1) Kion donas al vi la Esperanto-elsendoj de Pola Radio?

2) Kian signifon por vi persone kaj por la Esperanto-movado havas la Esperanto-elsendoj de Pola Radio?

3) Ĉu dank'al la Esperanto-elsendoj kreskis via scio pri la naskiĝlando de Esperanto Pollando?

Oni respondu laŭplaĉe, per kelkaj frazoj aŭ per longa letero, je unu aŭ je ĉiuj tri demandoj. Ĉiu kontribuaĵo, eĉ plej malgranda, estos valora materialo por pripensi la estontan formon de la Esperanto-disaŭdigoj de Pola Radio.

La Esperanto-disaŭdigoj de Pola Radio estas la sola en la mondo ĉiutaga radioprogramo en la servo de la esperantistaro. Valoras subteni ĝin per aktiva aŭskultado, per leteroj, per kontributado al ĝia programo. Skribu al la adreso: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, Varsovio, Pollando.

RADIO ROMA. 6-IX, Tra la literaturo; 13-IX, Novaĵoj el Italujo; 20-IX, Italaj kanzonoj en Esperanto; 27-IX, Leterkesto; 4-X, Floreto pri Sankta Francisko; 11-X, La itala urbo Lucca; 18-X, La itala poeto Giacomo Leopardi; 25-X, La reĝa palaco de Caserta. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto".

Informojn pri radio sendu al s-ro G. Larg-lantier, 29 Bd. Murat, F-75-Paris (16e), Francujo. Por aliaj detaloj vidu la julian eldonon.

P.I.V.: decide grava por scienco kaj tekniko

(daŭrigo de p. 139)

publikigitaj post la dua eldono de la P.V. en 1934" (p.xiii).

Ĉe multaj artikoloj oni trovas ne nur plibonigon kompare kun PV, sed karakteran ŝanĝon: anstataŭ simplaj proksimumaĵoj oni trovas nun detalajn priskribojn, tiel ke PIV jam multe pli similas al enciklopedieto, ol al nura vortaro. Kiu serĉis en PV iluminiĝon pri, ekzemple, 'malvo', eksciis nur, ke ĝi estas "Veg. el fam. malvacoj, kun rozviolaj floroj (**malva**)". En PIV, aliflanke, li trovos 9-linian artikoleon sufiĉe informplenan. Se li scivolis, kiu estis Reĝo Edipo, li neniun spuron trovis en PV, ĉar tiu ne registris proprajn nomojn. En PIV li trovos almenaŭ la bazajn informojn.

Recenzo pri verko tiel evidente valora, epokfara kaj admirinda, kiel Plena Ilustrita Vortaro, necese devas esti pli priskriba, ol kritika. Al la fina produkto kontribuis la plej elstaraj fakuloj de la Esperanto-movado dum pli-ol-40-jara evoluo. Estus pedante kaj miope, tian kolektivian fortostreĉon pretervidi, ĉikanante pri iaj eraretoj ĉe unuopaj vortoj aŭ difinoj. Eraroj ne mankas — sed tio ja estas neevitebla en tia verko milion-vorta.

La kritikoj estu do tute principaj, kaj da ili estas du ĉefaj.

La unua estas, ke en multaj kazoj la enskriboj montras troan preskribemon kaj ignoron de la efektiva uzado. Dum ĉiu parolas pri 'televido', PIV havas 'televizio'. Dum la esperantistoj diskutas pri Kongo, Kongolando kaj Kongio, PIV aldonas novan elpensajon Kongolo. Nigerio entute ne aperas; anstataŭas ĝin la neuzata 'Niĝerio'.

Simile, dum la vortaro fidele registras la tri variantojn Svedujo, Svedio kaj Svedlando, ĝi ignoras 'Israelo' kaj enkondukas 'Izraelio'. La reveno al la formo 'budĝeto' malatentas la evolu-tendencon. La biblia Kipro transformiĝis de insulo al fumajita fiŝo. Anstataŭ la konataj vortoj ingredienco kaj precedenco estas favorataj 'ingrediento' kaj 'precedento'. Ktp.

La dua kritiko estas, ke la Vortaro ĝenerale montras troan eŭropemon, por ne diri: francemon. Parte tio estas manko, pri kiu kulpas ne la aŭtoro, sed la geografia malekvilibro de la Esperanto-movado. Vane ni postulus ĝustajn difinojn de ekz-e hindaj aferoj, dum mankas en la movado hindaj kompetentuloj. Sed kiel defendi, ke el la 28 muzikiloj bildigitaj nur 1 estas neeŭropa? Aŭ ke enestas amaso da individuaj nomoj eŭropaj (Dagoberto, Damiano, Demetrio, Denizo ktp.), sed eĉ ne la plej oftaj japanaj? Aŭ ke aperas nomoj de kvartaloj de Parizo (Montmartro, Montparnaso), sed mankas la grandaj antaŭkoloniaj urboj de Afriko: Kano, Bamako, Daresalamo k.a.? Ke mankas multmilionaj landoj kaj lingvoj (Asamujo, la haŭsa, joruba) favore al francaj provincoj kaj dialektoj (Rusiljono, la provenca, gaskona)?

Restas tamen la jam dirita: ke temas pri elstara verkego, decide grava precipe por la scienca kaj teknika literaturo de Esperanto kaj destinita ludi la saman mondan rolon, kiun ĝis nun ludadis la — subite arkaikiĝonta — Plena Vortaro.

V. Sadler

OFICIALA INFORMILO

N-ro 437, 1 aŭgusto 1970

EKSPEDO DE "ESPERANTO"

En la lastaj monatoj la revuo "Esperanto" estas eksperimente ekspedata ne nur el Rotterdam, sed al kelkaj landoj ankaŭ el aliaj urboj ekster Nederlando. La motivo de tio estas ŝparo de mono per profitado de malpli alta afranko-tarifo.

Ni petas la legantojn bone noti, ke tiu ŝanĝo koncernas sole nur la ekspedon. La administrado restas kiel antaŭe en Rotterdam, kaj sekve oni bonvolu direkti al la Centra Oficejo ĉiujn adres-ŝanĝojn, petojn kaj aliajn korespondadojn koncerne la revuon.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al art. 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj Delegitoj de UEA. Se ĝis la 15-a de novembro neniu membro protestos pro grava kaŭzo, la nomado fariĝos valida.

Argentino: Jorge Hess (D), Buenos Aires; Teresa Bellalta Cussó (FD), Córdoba. **Belgujo:** Manuel Halvelik, Borgerhout. **Danlando:** Robert Felby, Frederikssund. **Francujo:** Albert Cnudde, Grenoble; Roger Despiney, Le Perreux-sur-Marne; André Blondeaux, Loctudy; René Lecocq (VD), Tours. **F.R. Germanujo:** Ina Tautorat, Berlin; Richard Hoppe (FD), Wiesbaden; Reinhold Ritthaler, Winnweiler. **Grekujo:** Panajotis Zervos (JD), Athinai. **Japanujo:** Hino iwao, Ayabe; Nakajima kjoohi, Hatiōzi; Tezuka susumu (VD); Kodera ŝunkiĉi (FD); Muramacu jukijoŝi (FD); Takagi teiĉi (FD), Tokio; Hoŝida acuŝi (FD), Tomakomai. **Nederlando:** Hans Bakker (FD), Amsterdam; Wim Jansen (FD), Vlaardingen; Alex d'Oliveyra (VD), Zwolle. **Usono:** Marybeth Hornbeck, Mentone; Louis Stein (FD), San Diego.

NE PLU VALIDAS (en Jarlibro 1970)

Brazilo: Itapetininga; Rio de Janeiro (FD klimato). **Finnlando:** Imatra (D); Lohja (VD); Sipoo; Turku (FD asekuro). **Francujo:** Courbevoie; Locudy; Massy; Paris (VD Gaudry). **F.R. Germanujo:** Alsbheim; Hannover (VD). **Jugoslavio:** Panĉevo-Vojlovica; Sanica; Varazdin (D); Zagreb (FD tramtekniko). **Kanado:** Ottawa. **Meksiko:** Guadalajara (FD). **Nederlando:** Ede (VD); Lunteren. **Norvegujo:** Oslo (FD instruado). **Nov-Zelando:** Henderson. **Pollando:** Sosnowiec (VD); Warszawa (FD liberpensado). **Rumanujo:** Suceava. **Senegalio:** Dakar. **Sovetunio:** Kiŝinev; Mejdureĉensk. **Sudafriko:** Johannesburg (VD). **Svedujo:** Karlstad (FD instruado). **Urugvajo:** Montevideo (FD kemio). **Usono:** Arden; Boulder; Brooklyn; Burbank; Honolulu; Los Angeles (JD); San Diego (VD); Twin Falls; Villa Park.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Daŝgupta, s-ro Probal, Kolkata, Hindujo.
Enzlin, f-ino A., Berchem, Belgujo.
Maier, f-ino I., Truchtelfingen, F.R. Germanujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1970

237 Lecat, s-ino R.; 238 Verstraeten, s-ro J., Belgujo. 239 Borges dos Santos, s-ro M., Brazilo.

240 Terrazzini, s-ino L., Italujo. 241 Henderson, s-ro D.C., Kanado. 242 Bugge-Paulsen, s-ro R., Norvegujo. 243 van Hove, s-ro P., Sudafriko. 244 Kailenta, s-ro J., Usono.

DONACOJ (Gld.)

Fondajo Canuto (Por membrigi personojn en landoj kun transpagaj problemoj): F.R. Germanujo: Zilles, s-ro E., 10,—.

Fondajo Enciklopedio de Esperanto: Francujo: s-ro Schwartz kaj s-ino Kohl, 64,50. F.R. Germanujo: Maschke, s-ro E., 3,—.

Fondajo Oficeja Ilaro: Nederlando: N.N., 2330,60. La sekvantaj donacoj estas ĉiuj por la presejo. Brazilo: Bays, s-ro G. A., 33,—. Francujo: Bodeureau, s-ro, 7,40; Lavarenne, s-ro, 64,50; Lemaire, s-ro R., 6,45; Manceau, s-ro J., 32,25; Tavernier, s-ro R., 64,50; Thiollière, s-ro, 12,90; Vincent, s-ino J., 6,45. Germanujo: Becker, s-ro G., 58,—. Hispanujo: Arranz, d-ro P., 25,—. Nederlando: Boersma, s-ro T., 25,—. Portugalujo: Caetano, f-ino M. L., 60,—. Svedujo: Esperanto-Klubo en Uddevalla, 4230,40; Rudin, s-ino C., 34,86; Ytongbolagens Esperantoförening, 20,89.

Ĝenerala kaso: Portugalujo: Caetano, f-ino M. L., 59,—; de Freitas, s-ro M., 16,23.

Patrono A de TEJO: Japanujo: Isiguro, s-ro T. Kanada: ŌhUiginn, s-ro L.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

Universala Esperanto-Asocio

KOREKTOJ POR JARLIBRO 1970, UNUA PARTO

P. 241 Bonvolu translokigi la urbon Belfast (Antrim, Nordirlando) de Irlando al Britujo (p. 118).

P. 250 La tri fakdelegitoj ĉe Meolo, Italujo, apartenas al Massa. Ĉe Meolo estas nur unu delegito.

P. 254 Aldonu 1 linion "I-56100 Pisa 101 000" inter la 9a kaj 10a linioj.

Servoj de UEA

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA, (2040 Springbank Road, Port Credit, Ont., Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi, kontraŭ 1 respondkupono, kompletan liston de siaj programoj.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: KSM, 12, rue des Jacobins, F-63-Clermont-FD., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Historio ne ripetiĝas, kaj tamen vi povas salte veni al Vieno — kongresurbo 1970! 160-paĝa Kongresa Libro de la 55-a UK fariĝos interesa dokumento en via librokolekto. Reduktita prezo 2,70 gld. aŭ 6 int. rpk. Ankaŭ Kongresa Libro de Helsinki (1969) ne manku en via librejo. Sensacia prezo de 1,80 gld. aŭ 4 int. rpk. (ink. sendokostojn). Ambaŭ mendeblaj ĉe la Libro-servo de UEA.

ANONCETOJ

Tarifo: po 0,25 gld. por ĉiu vorto. Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj respondecas sole nur la anoncantoj.



Kvankam mi estas juna (12) ankoraŭ Esperanto-komencanto, mi tamen estas jam dumviva membro de UEA. Mi serĉas fidelajn korespond-geamikojn el la tuta mondo. Mi respondos al ĉiu kolor-poŝtkarto kaj letero. Mia adreso: S-ro Gerhard Weintz, D-6730 Neustadt (Weinstr.), Stettiner-Str. 26, FR Germanujo.

Prof. Richard E. Wood, Honolulu, plezure anoncas doktoriĝon, kaj translokiĝon al: Dept. of Foreign Languages, Louisiana State University, Baton Rouge, Louisiana 70803, Usono. Korespond-petoj bedaŭrinde netraktataj.

Por eldoni mondantologion sendu el ĉiuj landoj kelkajn ekzemplerojn de infangazetoj (bildstriaĵoj) en Esperanto aŭ en naciaj lingvoj. Rekompenco laŭ deziro. D-ro Arranz, Goya 89, Madrid-1, Hispanujo.

Mesaĝoj de la Sinjorino de ĉiuj popoloj. Pri Maria-aperoj en Amsterdamo. Presita broŝuro, 43 paĝoj, formato 15 x 23. Mendebla ĉe "Vrouwe van alle Volkeren", Postbus 7180, Amsterdam-9, ĝirkonto 797143. Banko: n-ro 23.00.31.900 Nederlandse Creditbank NV, Amsterdam-C. Senpage, tamen volonte, libervola kompenso.

Mi deziras interŝanĝi aŭ aĉeti afiŝojn, diapozitivojn turismajn aŭ striaĵojn, profesiajn modelojn aŭ fotojn de famekonataj lokoj de la tuta mondo. S-ro S. Wakamatsu, Nissan-Building 709, 52, 5-Chome, Jingu-mae, Sibuya-ku, Tokio 150.

Grupo de 15-30-jaraj geesperantistoj en Siberio deziras korespondi pri ĉiuj temoj. Respondo garantiita: Esperanto-klubo, p.k. 11, Barnaul-99, Sovetunio.

Vendas zorgitajn poŝtmarkkolektojn, ĉefe poŝtfreŝajn, apenaŭ duoblaĵojn. Francujo: Mi. 117 ... 1650, nombro 330 (i.a. pentraĵoj, Philatec), valoro 'Michel-1970' 530 MM. Nur entute 400 guldenoj. Aŭstrujo: Mi. 42 ... 1176, nombro 110, 'Michel-70' valoro 80 MM. Nur entute 60 guldenoj. Adreso: Euratom, vidu malsupre.

Filatelista Klubo Euratom Petten serĉas daŭran rilaton kun poŝtmarkkomercisto (novaĵoj-abonoj, prilaboro de mankolistoj). Inĝ. D. Klage, Talingstr. 8, Schoorl NH, Nederlando.

Vegetaranoj! Mi siatempe promesis al s-ano Ĥavkin, transpreni la gvidadon kaj reeldonon de "Vegetarano", organo de Tutmonda Vegetarana Asocio (TEVA). Tiun promeson mi devas plenumi, tio ja estas eĉ devo de eks-skolto. Bonvolu anonci vian adreson al: Ernesto Vana, Dudince (Zvolen) Slovakujo, Ĉeĥoslovakujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo, kvanton kontraŭ kvanto. H. Van der Mast, Velodroomstraat 2, B-2600 Berchem-Antwerpen, Belgujo.

Kiu helpus min trovi daŭran (ajnan) laboron en Eŭropo? Mi volas partopreni Universalajn Kongresojn de Esperanto. 38-jaraĝa esperantisto, flue parolas Esperante, hispane, france, angle. A. Hryniewicz, San Carlos 44, Santos Lugares-GSM, Argentino.

Mankas al mi diversaj antaŭmilitaj numeroj de "Sennaciulo". Kiu povos helpi min? Ramon Molera, Sta. Joaquina 13, Moyá (Barcelona), Hispanujo.

La verda flago flirtas kaj la plej bela suno de Eŭropo brilas super vilao "Tabou". Kiam ankoraŭ paĉjo Frosto ornamas viajn fenestrojn, tiam jam ekfloras ĉi tie migdalarboj kaj la mimozoj ankoraŭ pli forte brilas ol la suno. Kiam densa nebulo baras vian elrigardon, tiam vi ankoraŭ povas bani vin en Blua Maro (Côte d'Azur). Ĉu vi ne kredas tion? Do, skribu kaj venu! Ni parolas Esperanton kaj krokodilas bone la germanan, malbone la francan lingvojn. Helene Stoffers, Villa "Tabou", Supercassis 47, F-13-Cassis, Francujo. 20 km. oriente de Marseille.

Ĉiu esperantisto en tuta Afrika kontinento, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Estonio kaj Malproksima Oriento skribu al Radio de Svedio, Divizio de eksterl. progr., S-105 10 Stokholmo, petante programon en Esperanto. Menciuj, ke petis vin skribi Inter — Agadgrupo por Esperanto, kaj konigu la aferon en vialandaj Esperanto-informiloj. (Represu la anoncon).

Ĉu vi aŭskultas Esperanton en radio? Se jes, mendu tuj vian ekzempleron de "Radio-Bulteno" n-ro 2 (aŭtuno 1970) inkl. 20 pk por via korespondado. Jarkotizo: 1,00 us. dol. (5,20 s.kr., 3,60 ned. gld. aŭ 8 rpk). Nova mendinto ricevos "Bultenon" n-ro 1 senpage kaj la unuaj cent aliĝantoj donace elegantan kraĵon kun ora surskribo "Esperanto — Lingvo Internacia". Mendu ĉe Inter — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Senpage ni sendas informilon pri Univox-kursoj en Esperanto kaj 22 aliaj lingvoj, pri praktika kaj eleganta Kovrilo por Jarlibro de UEA kaj pri viaj rilatoj kun radiostacioj. Vi povas ankaŭ samtempe mendi nian Laborplanon kaj informon pri aktualaj agadoj por Esperanto. Skribu poŝtkarton al Inter — Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

Du finnaj sinjorinoj kaj unu sinjoro deziras korespondi kun diverslandanoj, pli volonte kun mezaĝaj. Bonvolu respondi al Unto Mustonen, Hallituskatu 39, Lauritsala, Finnlando.

Vintre okazos letervespero. Bonvolu sendi leterojn, pk aŭ esperantaĵojn al s-ro Raymond Pons, F-09-La Tour du Crieu, Francujo. Ni certe respondos al ĉiuj.

Institucio Hodler 68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio estas fondita en 1968 por plisolidigi la financon bazon de UEA. Detalojn informas la administrantino: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

KORESPONDEMULOJ!

Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian FOTON. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por SENPAGA aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Donacu libro-kartojn!


En multaj landoj ekzistas la bona kutimo donaci libro-karton aŭ libro-kuponon al siaj amikoj. La donacanto pagas iun sumon da mono al libro-vendejo kaj ricevas interŝanĝe specialan karton je tiu sama valoro. La karton li tiam sendas kun salutoj aŭ bondeziroj al iu amiko aŭ parenco. Tiu lasta, siavice, povas uzi la karton por aĉeti libron laŭ sia propra gusto kaj elekto.

Ankaŭ por Esperantaj libroj tiu metodo estas uzebla. Jam aperis specialaj, elegante presitaj donaco-kartoj je valoro de po 5,— guldenoj. La kartojn oni povas aĉeti kaj uzi ĉe la Libroservo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando). Oni pagas nur la efektivan valoron (5,— gld.) plus sendokostoj (10%). La kartoj havas la oportunan formaton A6 (105 x 148 mm).

Ĉu vi foje cerbumis, kian donacon sendi al via korespond-amiko eksterlanda? Kiel scii, kion li jam posedas, aŭ kiujn librojn li jam legis? La donaco-karto de UEA solvas tiun problemon! Via amiko povos mem elekti el mil diversaj eblecoj: libron, diskon, gazetabonon aŭ ion ajn mendeblan ĉe la Libroservo de UEA, ĝis la valoro de 5,— gld. (aŭ pluroble 5,— gld., se vi sendos plurajn kartojn).

Lanterno

SENDEPENDA INTERNACIA GAZETO



Moderna 12-paĝa monata gazeto. Jarabono 10 germanaj markoj aŭ egalvaloro.

Enhavas krom artikolojn pri aktualaj mond-problemoj ankaŭ informojn el la Movado, felietonon, spegulon de la E-gazetaro, humuraĵojn, rubrikon por ŝakamantoj kaj enigmuloj, anoncetojn kaj reklamojn.


La gazeto, kiu estas alia!

Ne prokrastu peti senkoston provekzempleron de la redakcio kaj eldonentrepreno:

LANTERNO, D-8 München 25, Postfach 473, F.R. Germanujo

Por la Semajno de Internacia Amikeco

La lasta kompleta
semajno
en februaro



Amikeco trans limoj

AMIKO-KARTOJ

por salutoj al eksterlandaj amikoj
Kun la emblemo kaj, aliflanke, kadro konsistanta el la vortoj "Semajno de Internacia Amikeco" en diversaj lingvoj.

Prezo: po 0,15 gld.* + sendokostoj 10 %.

GLUMARKOJ

por surglui sur leterojn kaj salutkartojn.
Trikoloraj. Formato: 3,3 × 5 cm.

Prezo: po 0,06 gld.* + sendokostoj 10 %.

* Por Nederlando aldoniĝas 12% da impostoj.


UNUAFOJE EN LA INTERNACIA LINGVO

**Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj
kaj Statuto de la Internacia Kortumo**

Tr. R. Harry, I. Lapenna, E. Svanberg
Eld. UEA. 96 p. 3,— gld. * afr.

Eldonkvanto limigita!

*En Nederlando: 3,10 gld. afr.



VARBINTE ANONCOJN

por la Jarlibro de UEA, de turismaj, kamercaj aŭ aliaj instancoj, vi povas ricevi 10%-an maklerajon el la anonco-prezoj. Al anonc-perantoj la C.O. en Rotterdam volonte disponigas informan cirkuleron kaj specimenajn ekzemplerojn de la Jarlibro.



Universala Esperanta Stenografio.
Lernolibro por memlernado
aperis sub la aspicioj de UEA kaj
de EKI.

(prezo: gld. 17.75 = 71 steloj).
Mondo, Rothstr. 7, CH-8057 Zürich

HELPU REKLAMI



LA 57-AN

Universalan Kongreson
en Portland (Usono),
uzante sur viaj
korespondadoj la
allogan trikoloran
glumarkon!

Folio po 10 markoj
kostas 0,55 gld.,
afrankite (por Neder-
lando: 0,60 gld. afr.).

Mendu ĉe UEA

ESPERANTISTA BONFARECO

"Mi esperas, ke la esperantista movado estos tiel forta, ke ĝi altiros en ĉiuj landoj multajn junajn homojn, kiuj ne nur estas idealistoj kaj entuziasmaj pri la granda ideo de internacia interkompreniĝo, sed ankaŭ **tiel praktike agantaj**, ke ili gajnos per praktika aplikado de Esperanto multajn amikojn, kiuj poste kunhelpas por vasta prospero de Esperanto."

Min apogante sur ĉi tiuj gravaj vortoj de la prezidanto de Aŭstrujo kaj alta protektanto de la 55-a UK en Vieno, d-ro Franz Jonas, amike kaj frate mi invitas vin konsideri kaj iamaniere imiti la bonfarecan ekzemplon de prof-ino Norma Dell' Aringa, delegitino de UEA en Mantova, Italujo, kiu ne nur persone helpas la konstruotan

"PAVILONON DE ESPERANTISTA FRATECO"
en Madras, Hindujo, sed ankaŭ senpage instruas Esperanton, kondiĉe ke oni kontribuu al la porleprula fonduso **dum ĉi tiu tria jaro — 1970 — de ĝia kvinjara plano.**

Ĉar la evoluo estas la nova nomo de la paco, ankaŭ vi bonvolu sendi ian ajn monoferon al la kasisto de la porpavilona fonduso:

D-ro Cesare Ferrari, Viale dei Mille, 37, I-20129 Milano, Italujo. (Poŝta ĝirkonto 3-7791,, porleprula pavilona fonduso)

aŭ, se vi volas rekte al iniciatinto:

Sac. Petro M. Urbaitis S.D.B. Lituani Don Bosco, Via Colona 2, I-00044 Frascati, Roma.

AARHUS

La internaciaj feriaj **aŭtunaj** Esperanto-kursoj okazos 18-24 de oktobro en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ (tute moderna) en Aarhus, Danlando. Venu por ĝui belan feriosemajnon en vere Esperanta rondo kaj en regiono kun plej multkoloraj arbaroj apud blua maro. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,
Ingemannsvej 9,
DK-8230 Aabyhøj, Danlando.

Ramona van Dalsem kantas himnon de la amikeco DONU AL MI VIAN MANON...

Toos Schoonman akompanas plane.

Aliaj kantoj sur tiu stereofona disko (45 t/m, ankaŭ monofone ludebla): "La eŝo", "La letero", "Prin-tempo". Originalaj esperanto-kanzonoj laŭ tekstoj kaj melodioj de Ramona van Dalsem. La akompanaĵojn faris Toos Schoonman kaj Kees Olthuis.

Prezo 5,75 gld. El Nederlando bv. mendi rekte ĉe R. v. Dalsem, Bussumsestr. 18, Den Haag, Nederlando. El aliaj landoj mendebla ankaŭ ĉe UEA. Aldonu sendokostojn 10 %.